M. DE CERVANTES SAAVEDRA

La malprudenta Scivolulo

novelo el la fama verko "DON-KIĤOTO"

La malprudenta

Scivolulo

LA MALPRUDENTA
SCIVOLULO

Federación Española de Esperanto
Hispana Esperanto - Federacio
Rodríguez San Pedro 13 - 3º - 7, E-28015 MADRID
Tel. +34 - (9)1 - 4468079

2743
16x199 hef002743 YY

AMORO NE GARDAS RESPEKTON NEK ATENTAS MEZURON DE PRUDENTO EN SIAJ AGOJ. LI HAVAS SAMAN KAPABLON OL LA MORTO, KIU TIEL ATAKAS LA ALTAJN PALACOJN DE LA REĜOJ, KIEL LA HUMILAJN KABANOJN DE LA PAŜTISTOJ

CERVANTES

CERVANTES

ĈIUJ RAJTOJ ESTAS REZERVATAJ

M. DE CERVANTES SAAVEDRA

LA MALPRUDENTA SCIVOLULO

33ª - 34ª kaj 35ª ĈAPITROJ
DE LA VERKO «DON-KIĤOTO»

El la hispanlingva originalo tradukis

LUIS HERNANDEZ

Eldono: Luis Hernandez - VALENCIA (Hispanio) 1955

Ilustroj: Rafael Raga
Vinjetoj: Luis Hernandez
Linotipo: García Viguer

La eksteran kovrilon oni reproduktis en Litografejo M. Garcia Cantos

KARA LEGANTO:

Jen pliaj tri ĉapitroj de «Don-Kiĥoto» en la Internacia Lingvo. Ili aperas nun en formo de aparta kompleta novelo, kiu, pro tio mem, liveros pli ĝustan komprenon pri la pozitivaj rezultatoj jam atingitaj en la grava entrepreno —super kiu streĉe kaj daŭre mi laboras— por digne iam prezenti al la esperantista mondo ne nur simplan specimenon sed belan eldonon, en ĝia tuta amplekso, laŭ plej adekvata maniero, de la admirinda kaj grandioza verko de Cervantes.

Pri la nuna traduko el tiu klasika originalo, kies malfacila teksto kaj stilo ne ĉiam aspektas klare eĉ mem al hispanoj, estu dirite ke du eminentaj samideanoj, akademianoj: D-ro. Ferenc Szilágyi kaj S-ro. Saldanha Carreira, bonvolis tralegi la manuskripton, farinte interesajn kaj valorajn rimarkojn, kiuj multe utilis kaj multe taŭgis por la fina polurado.

Cetere, bona amiko kaj bona poeto, S-ro. F. Vilá el Barcelono, tre afable min helpis en la tikla tasko traduki la diversajn versaĵojn, kiuj, laŭ kutimo de la epoko, garnas kaj ornamas kelkajn paĝojn.

Ĉar temas, kiel jam dirite, pri specimeno de verko ankoraŭ en prilaboro, volonte kaj danke mi akceptos sugestojn, kritikojn aŭ atentigojn de ĉiu helpema leganto, kiu, en rekta kontribuo al la plej alta perfekteco de la tuta aranĝo, stimulos tiel per sia morala subteno la fervoron de

LA TRADUKINTO

Luis Hernandez

Recaredo, 22, 1.° Valencia (Hispanio)

Somero 1955.

Originala Titolo:

EL CURIOSO IMPERTINENTE

ANTAŬPAROLO

Sciinde estas, ke ne nur unu sola romano, sed riĉa kolekto da ili, bone provizas la enhavon de «La Genia Kavaliro Don-Kiĥoto de la Manĉo», plej supera verko de la klasika hispana literaturo kaj majstra priskribo de nobla figuro, kiu, kvankam fantazie kreita de Cervantes, akiris tamen materian formon, trans ĉiuj landlimoj, kaj fariĝis eterna proprajo de la tuta homaro, kiel universala simbolo de obstina strebado al ĉiu ideala entreprenc, al ĉiu romantika sonĝo, en flugo al tiu bono pri kiu oni en la mondo sopiras aŭ revas.

Inter la eksterordinaraj kaj mirindaj aventuroj, okazintaj al nia brava heroo dum lia kavalireca vagado, komence de la XVII[a] jarcento, troviĝas apartaj rakontoj pli aŭ malpli iongaj, el kiuj kelkaj fakte konsistigas sendependajn novelojn. Unu el ili, sendube la plej kompleta, estas la ekzemplodona historio de LA MALPRUDENTA SCIVOLULO, tiu stranga edzo, kiu volis fari praktikajn ekzercojn, pere de ĝentila amiko, por kalkuli kiom da gradoj aŭ kiom da efektiva rezisto havis la fideleco de sia bela edzino.

En kontrasto kun la stultaj zorgoj de la edzo kaj la prudentaj rezonoj de la amiko, elstaras la ĉarma virineco de la edzino. Ĉar kvankam ŝi ne rezistis la malsaĝajn provojn, kiujn ŝia edzo varpis, tio ja vere okazis —ĉu ne pardoninde?— pro ŝia vive radianta naturo, kiun la leĝa posedanto klopodis science analizi anstataŭ nur pasie frandi.

...Kaj per tiaj lecionoj el pasintaj epokoj, ankoraŭ nun oni povas lerni, ĉar se nia jarcento rajtas fanfaroni pri ege evoluanta tekniko, en aŭdace senhalta progreso, oni certe ne estas hodiaŭ pli sperta, kiam temas pri aferoj en kiuj petolas Amoro, ol dum la regado de la faraonoj...

L. H.

En ĉambro de vojgastejo dormas Don-Kiĥoto; en proksima loko, ĉirkaŭ tablo, sidas pluraj personoj venintaj kun li. Inter ili troviĝas la Pastro kaj la Barbiro de lia vilaĝo. Post manĝo, oni babilas pri kavalirafoj kaj oni diskutas pri libroj; la gastejmastro montras kelkajn manskribitajn paperojn, kiujn gasto forlasis en valizo. Tiam oni petas, ke la Pastro laŭte legu ilin por distre pasigi la tempon, al kio ĉiuj ĉeestantoj rapide konsentas.

...Vidante tion, kaj komprenante, ke al ĉiuj li havigos plaĉon, kaj ke li mem ankaŭ ĝin ricevos, la Pastro diris:

—Se tiele, do, estu vi ĉiuj atentaj, ĉar la novelo komenciĝas laŭ jena maniero:



NOVELO PRI LA MALPRUDENTA SCIVOLULO

En Firenzo, riĉa kaj fama urbo de Italio, en la provinco nomata Toskano, vivis Anselmo kaj Lotario, du riĉaj kaj precipaj kavaliroj, tiel bonaj amikoj, ke, plej ekstreme kaj supermezure, ĉiuj konatoj nomis ilin: *la du amikoj.* Ili estis fraŭloj, junuloj kun sama aĝo kaj samaj kutimoj, kio estis sufiĉa kaŭzo por ligi ilin per reciproka amikeco. Tamen, ankaŭ vere, Anselmo iomete pli emis al la amaj distroj ol Lotario, kiun forlogis tiuj de la ĉaso. Sed, kiam necese, Anselmo rezignis siajn preferojn por sekvi tiujn de Lotario; kaj Lotario forlasis la siajn por partopreni tiujn de Anselmo. Sekve, iliaj voloj marŝis tiel akorde, ke ne ekzistis akurata horloĝo en pli bona ordo.

Troviĝis Anselmo perdita de amo al Kamila, altranga kaj bela knabino el la sama urbo, filino de tre bonaj gepatroj, kaj tiel bona per si mem, ke li decidis kun la konsilo de sia amiko Lotario —sen kio nenion li faris— peti ŝin kiel edzinon al ŝiaj gepatroj. Kaj tio efektiviĝis, ĉar Lotario plenumis la komision kaj solvis la aferon tiel glate, laŭ la gusto de sia amiko, ke, post mallonga tempo, Anselmo ĝuis la deziratan posedaĵon; same kiel Kamila, kiu, tre kontenta, ĉar Anselmo fariĝis ŝia edzo, dankis senĉese al la ĉielo kaj al Lotario, kies perado tiom da feliĉo al ŝi donis. Dum la unuaj tagoj, kiuj kutime estas ĝojaj en ĉiu geedziĝo, Lotario vizitis kiel ordinare la hejmon de sia amiko, zorgante honori, komplezi kaj amuzi lin per ĉio plej oportuna. Sed, finitaj la festoj kaj reduktita la ofteco de vizitoj kaj gratuloj, Lotario komencis zorge malzorgi la venojn en la domon de Anselmo, ĉar ŝajnis al li (kiel decas ŝajni al ĉiu diskretulo) ke oni ne devas viziti nek frekventi la hejmojn de edziĝintaj amikoj, same ol kiam ili estis fraŭloj; ĉar, kvankam ĉiu bona kaj vera amikeco ne povas nek devas

iĝi suspektinda, la honoro de ĉiu edzo estas, malgraŭ tio, tiel delikata, ke se facile oni riskas ĝin ofendi, eĉ pere de la propraj fratoj, ankoraŭ pli pere de la amikoj.

Rimarkis Anselmo la evitemon de Lotario kaj formulis grandajn plendojn dirante, ke se li estus sciinta, ke lia edziĝo povus esti kaŭzo por ne rilati kiel kutime, neniam ĝi estus okazinta; kaj, se pro la bona kompreno, kiu inter ili ambaŭ ekzistis dum lia fraŭleco, ili meritis la dolĉan kvalifikon esti alnomataj *la du amikoj,* oni ne devas nun permesi pro emo ludi singardemon, sen iu alia kaŭzo, ke tiel fama kaj agrabla titolo estu perdita. Sekve, li petegas —se tiu parolmaniero ĝustas inter ili— ke denove li reiĝu sinjoro en lia domo, enirante kaj elirante ĝin kiel antaŭe. Li asertis, cetere, ke lia edzino Kamila ne havas alian volon, nek alian guston, krom tiu, kiun li havas. Tial, sciante kiel funde ili sin estimis, ŝi troviĝas konfuza pro lia nuna retenemo.

Al ĉi tiuj kaj multaj aliaj rezonoj, kiujn Anselmo diris al Lotario, por persvadi lin viziti kiel kutime lian domon, Lotario respondis tiel prudente, diskrete kaj lerte, ke Anselmo restis tute trankvila pri la bona intenco de sia amiko. Ili decidis en konsento, ke du tagojn en ĉiu semajno, kaj la festotagojn, Lotario venos por manĝi ĉe li; kaj, kvankam tion ili interkonsentis, Lotario pensis fari nenion ekster tio, kio plej konvenos al la honoro de lia amiko, kies famo estis al li pli kara ol la propra.

Li diris —kaj trafe li diris— ke tiu edzo, al kiu la ĉielo donis belan edzinon, tiel same devas zorgi pri la amikoj, kiujn li enlasas hejmen, kiel atenti pri la amikinoj kun kiuj lia edzino konversacias; ĉar tion, kion oni ne faras aŭ oni ne aranĝas en la placoj, en la preĝejoj, en la publikaj festoj aŭ en la stacioj (lokoj, kiujn la edzoj ne ĉiam devas malpermesi al siaj edzinoj) oni aranĝas kaj oni faciligas ĉe amikino aŭ parencino, je kiuj pli da konfido ili havas.

Lotario ankaŭ diris pri la bezono de ĉiu edzo havi amikon, kiu avertos lin pri la neglektoj okazintaj en lia konduto; ĉar, pro la multa amo, kiun la edzo gardas al sia edzino, ordinare li ne avertas aŭ ne atentigas ŝin —por ne malkontentigi ŝin— pri la konveneco fari aŭ ne fari ion el tiuj aferoj de kies plenumo aŭ malplenumo dependas honoro aŭ malhonoro. Pro tio, avertita de amiko, facile oni metus rimedon al ĉio. Sed, kie troviĝas amiko tiel diskreta, tiel lojala kaj tiel fervora, kiel nun proponas Lotario? Oni ja certe ne scias! Sole nur Lotario estis tia homo; ĉar, plej akurate kaj diligente, li gardis la honoron de sia amiko, klopodante redukti kaj limigi la tagojn de la interkonsenta vizitado, por ke antaŭ la neniofara plebanaro kaj erarvagaj aŭ malicaj okuloj ne aspektu suspektinda la eniro de riĉa junulo, nobela kaj eleganta, krom aliaj ceteraj kvalitoj, kiujn li opiniis posedi, en la loĝejon de virino tiel bela, kiel Kamila; ĉar, kvankam ŝiaj virtoj kaj honesteco povus meti bridon al la plej klaĉema lango, neniel li volis ĵeti dubojn al ŝia famo nek al tiu de sia amiko. Tial, multajn tagojn el la interkonsento li okupis kaj fordistris por aliaj aferoj, kiujn li prezentis kvazaŭ ili estus neeviteblaj; sekve, per plendoj de unu kaj senkulpigoj de la alia, forpasis multaj momentoj kaj partoj de la tagoj. Sed, en unu el tiuj kiam ili ambaŭ promenis tra herbejo, ekster la urbo, Anselmo diris al Lotario la sekvantajn vortojn:

—Certe vi supozas, amiko Lotario, ke neniel mi povos rekompenci, per danko digna de la ricevita bono, la favorojn, kiujn Dio al mi donis, kiam mi fariĝis filo de gepatroj tiaj, kiaj la miaj, aŭ kiam per malavara mano oni donis al mi havaĵojn el tiuj nomataj de naturo kaj ankaŭ de fortuno; super ĉio pro la fakto, ke vi estas mia amiko kaj Kamila propra edzino: du juveloj, kiujn mi estimas se ne en la grado pri kiu mi devas, almenaŭ en tiu pri kiu mi povas. Tamen, kun ĉiuj ĉi partoj, kiuj ordinare estas la tuto per

kiu la homoj povas kaj devas vivi kontentaj, mi vivas kvazaŭ plej malĝoja kaj malgaja persono de la tuta universomondo; ĉar, mi ne scias de post kiom da tagoj, ĝenas min kaj premas min iu deziro, tiel stranga kaj tiel fremda por la komuna uzo de aliaj, ke mi miras pri mi mem; kaj mi min kulpigas, kaj mi min admonas, penante prisilenti ĝin kaj eĉ kaŝegi ĝin, antaŭ miaj propraj pensoj; kaj tiel mi sukcesis gardi mian sekreton, kvazaŭ intence mi volus malkovri ĝin al la tuta mondo. Nu, tial ke nepre ĝi eliros publike, mi volas, ke tio okazu en la arkivo de via prudento; kaj fidante al ĝi kaj al la diligento, kiun vi aplikos por min helpi, kiel vera amiko, baldaŭ mi estos libera de la angoro, kiu min premas, kaj altiĝos la ĝojo pro via afableco ĝis la grado, kiun atingis la malĝojo pro mia frenezo.

Lotario statis konfuza pro la vortoj de Anselmo, ne sciante, kion celis tiom longa preparo aŭ enkonduko. Kvankam li cerbumis en sia imago, kia deziro povus tiel funde ĝeni lian amikon, ĉiam li trafis tre malproksime la kernon de la vero. Kaj, por eliri rapide el la angoro, kiun la konfuzo al li havigis, li diris, ke estas evidenta ofendo al ilia granda amikeco serĉi elturniĝojn por malkovri siajn plej vualitajn pensojn, ĉar tute certe li rajtas atendi jen konsilojn per ilin mildigi aŭ jen rimedojn por ilin efektivigi.

—Tio estas vera —respondis Anselmo— kaj laŭ tia fido mi sciigas vin, amiko Lotario, ke la deziro, kiu min ĝenas, kuŝas en la penso ĉu Kamila, mia edzino, estas tiel honesta aŭ tiel perfekta kiel mi kredas; kaj tute mi ne povos scii pri la vero, se mi ne provas ŝin laŭ maniero, ke la provo montru la karatojn de ŝia pureco, same kiel la fajro montras tiujn de la oro; ĉar mi prezentas al mi —ho amiko!— ke neniu virino estas pli bona ol kiom ŝi estas aŭ ne estas tentata; kaj nur tiu estas forta, kiu ne fleksiĝas al la promesoj, al la donacoj, al la larmoj kaj al la daŭraj kom-

Anselmo kaj Lotario, du riĉaj kaj precipaj kavaliroj...

plimentoj de pretaj amindumantoj. Ĉar, kion por danki —li diris— ke virino estas honesta, se neniu logis ŝin al malhonesteco? Kio do gravas, ke tiu estas detenema kaj singaderma, kiu ne havis okazon por petoli; aŭ tiu, kiu scias, ke ŝia edzo ĉe la unua petolaĵo forigos al ŝi la vivon? Sekve, virino honesta nur pro timo, aŭ pro manko de okazo,

ne meritas rangi en la sama estimo kiel tiu virino, tentata kaj instigata, kiu sukcesis elpaŝi kun la krono de la venko.

Nu, pro ĉi tiuj motivoj kaj multaj aliaj, kiujn mi povus prezenti al vi, por fidindigi kaj plifortigi mian opinion, mi deziras, ke Kamila, mia edzino, elpaŝu tra tiaj malfacilajoj por sin hardi kaj forĝi per la fajro de tentoj kaj logoj de viro posedanta sufiĉajn meritojn por aspiri al ŝiaj favoroj. Kaj se ŝi elpaŝos, kiel mi esperas, kun la laŭro de tia batalo, mi taksos senegala mian feliĉon; kaj vere mi povos aserti, ke fariĝis plena la malpleno de miaj deziroj; mi konstatos tiam, ke la bona sorto regalis min per la forta edzino pri kiu la Saĝulo demandis: kiu ŝin trovos? kaj en la okazo, ke tio fluos kontraŭe al miaj supozoj, kun la konvinko, ke mi trafis en mia deziro, mi elportos sen peno la penon, kiun prave kostos al mi mia kara eksperimento. Kaj antaŭ la konsidero ke nenio, kion vi diros kontraŭ mia intenco, estos efika por ne efektivigi ĝin, mi volas, ho amiko Lotario! ke vi pretigu vin esti la instrumento, kiu prilaboros ĉi tiun verkon laŭ mia gusto, ĉar mi ebligos al vi ŝancojn por fari tion, sen manko de ĉio, kion mi juĝos necesa por plaĉi al virino honesta, ĉasta, diskreta kaj prudenta. Inter aliaj motivoj, puŝas min konfidi al vi ĉi tiun malfacilan taskon la konscio, ke —se Kamila estos venkita de vi— ne venos la venko ĝis lasta ekstremo kaj rigoro, sed nur ĝis la limo vidi, kvazaŭ jam farita, kio ankoraŭ ne fariĝis pro deca respekto. Tiel, mi restos ofendita nur per la intenco; kaj mia ofendo restos kaŝita en la virto de via silento, pri kiu bone mi scias, en kio min koncernas, ke ĝi daŭros eterne, kiel tiu de la morto. En konkludo, se vi volas, ke mia vivo estu vivinda, nepre vi devas partopreni en ĉi tiu ama batalo, ne malvarme nek maldiligente, sed obstine kaj fervore, kiel mia deziro postulas kaj la sincereco de nia amikeco garantias.

Jen estas la vortoj, kiujn Anselmo diris al Lotario, kiu

aŭskultis ilin plej atente, kvazaŭ ili ne estus tiuj mem, kiujn li diris kaj ĉi tie oni skribis. Ĝis la fino li ne malsigelis siajn lipojn; kaj, vidante tiam ke nenion plu li diris, post longedaŭra rigardado, kiel oni rigardas ion, kion oni neniam vidis, kaj pro tio ĝi elvokas admiron aŭ teruron, li diris:

—Mi ne povas min persvadi, ho amiko Anselmo! ĉu ne estas ŝerco la vortoj, kiujn vi ĵus diris; ĉar en la supozo ke serioze vi parolis, neniel mi konsentus, ke tiom antaŭen vi alpaŝus; kaj ne aŭskultante vin, mi estus evitinta vian longan alparolon. Sendube mi imagas, ke vi min ne konas aŭ mi vin ne konas... Sed, ne; tre bone mi scias, ke vi estas Anselmo; kaj same vi scias, ke mi estas Lotario. La domaĝo troviĝas en tio, ke mi pensas ĉu vi ne estas la ordinara Anselmo, kaj verŝajne ankaŭ vi pensis, ke mi ne estas la kutima Lotario, ĉar tio, kion vi diris, ne decas al tiu Anselmo, mia amiko, nek tion, kion vi petas, oni devas peti al tiu Lotario, kiun vi konas, ĉar la bonaj amikoj rajtas provi siajn amikojn kaj profiti je ili *usque ad aras*, kiel diris poeto, kiu volis diri, ke oni ne devas profiti la amikecon por aferoj kontraŭ Dio. Nu, se pagano tion diris pri la amikeco, kiom pli profunde devas ĝin kompreni kristano scianta, ke por nenio homa oni devas perdi la dian amikecon? Kaj eĉ kiam amiko renversas la barieron kaj metas flanken la rajtojn de la ĉielo, por atenti tiujn de sia amiko, tio ne okazu por aferoj banalaj aŭ efemeraj, sed nur por tiuj, kie estas en risko la honoro kaj la vivo de l'amiko. Diru vi, do, nun, Anselmo: kiu el tiuj du kondiĉoj troviĝas en danĝero, por kuraĝigi min komplezi vin per plenumo de la abomenaĵo, kiun vi de mi postulas? Neniu, tute certe! Kvankam vi petas, laŭ mia kompreno, klopodi kaj peni por preni al vi la honoron kaj la vivon, prenante tion al mi samtempe. Ĉar, klopodante preni vian honoron, ankaŭ mi klopodos preni vian vivon, tial ke viro sen honoro estas pli

kompatinda ol mortinto; kaj, se mi fariĝas la instrumento, kiel vi deziras, por tiom da malbono, ĉu mi ne restos sen honoro kaj, pro natura sekvo, ankaŭ sen la vivo? Aŭskultu, do, amiko Anselmo, kaj havu paciencon por ne respondi ĝis mi finos diri ĉion, kion mi konsideros necesa kontraŭ via stranga deziro, ĉar estos tempo al vi por min respondi, kaj al mi por vin aŭskulti.

—Tre volonte —diris Anselmo— parolu laŭplaĉe.

Kaj Lotario daŭrigis dirante:

—Ŝajnas al mi, ho Anselmo! ke via saĝo statas nun same kiel tiu de la maŭroj (*), al kiuj oni povas klarigi la erarojn de ilia sekto nek per komentoj de la Sankta Skribo, nek per rezonoj konsistantaj el spekulativaĵoj de la intelekto aŭ fundamentitaj sur principoj de la Fido, sed oni devas prezenti al ili ekzemplojn palpeblajn, facile kompreneblajn, demonstreblajn kaj nedubeblajn, kun matematikaj demonstracioj, absolute neneigeblaj, same kiel oni diras: *Se el du egalaj partoj, oni prenas egalajn partojn, ĉiam restas nur egalaj partoj.* Kaj, se ili tion ne komprenas parole, kiel efektive okazas, oni devas gestadi al ili per la manoj aŭ meti la tezojn antaŭ iliajn okulojn, kvankam ankoraŭ kun ĉio ĉi tio neniu kapablas persvadi ilin pri la veraĵoj de nia sankta religio. Ŝajne, tiu sama rimedo aŭ maniero estus konvena por vi, ĉar la deziro, kiu ĉe vi naskiĝis, galopas tiel vojerare kaj tiel ekstere de ĉia ombro da saĝeco, ke —ŝajnas al mi— estus malŝparita la tempo, kiun mi dediĉus por komprenigi al vi vian simplecon, al kiu mi ne volas doni nun alian nomon. Mi emas... eĉ lasi vin en via sensencaĵo, kiel puno por via malsana deziro; sed la estimo, kiun mi al vi havas, ne permesas apliki tiun rigoron nek lasi vin sub tiel evidenta danĝero de pereo. Kaj, por klare tion vidi, diru vi, Anselmo: Ĉu vi ne ĵus diris, ke mi

(*) Nomo, kiun oni ĝenerale donas en Hispanio al la araboj.

devas logi honestulinon, tenti ĉastulinon, persvadi diskretulinon kaj servi prudentulinon? Jes, tion vi diris! Nu, se vi jam scias, ke via edzino estas honesta, ĉasta, diskreta kaj prudenta, kion vi serĉas?

Kaj se vi jam supozas, ke ŝi eliros sukcese el ĉiuj miaj atakoj, kiel certe ŝi eliros, kiajn do pli bonajn titolojn vi pensas al ŝi atribui krom tiuj, kiujn ŝi jam havas, aŭ per kio poste ŝi estos pli digna ol nun ŝi estas? Sekve, aŭ vi ne taksas ŝin tiel alte, kiel vi asertas, aŭ tute vi ne scias, kion vi deziras. Se vi ne taksas ŝin tiel alte, kiel vi asertas, por kio vi volas ŝin elprovi? Tiuokaze, ĉar malpura, ŝi meritas nur adekvatan trakton. Tamen, se ŝi estas tiel bona, kiel vi asertas, impertinenta ago estos fari eksperimentojn pri la propra konvinko; ĉar post la provo, ŝi restos en la sama kategorio en kiu unue ŝi rangis. Kaj tio, en definitiva konkludo, entrepreni aferojn en kiuj pli facile oni povos sperti domaĝojn ol avantaĝojn apartenas al mensoj provokemaj kaj senordaj, multe pli kiam ili sin miksas en demandojn al kiuj neniu pelas nek puŝas, sed kiuj de malproksime jam avertas, ke aliĝi al ili estas evidenta frenezaĵo.

La malfacilajn taskojn oni entreprenas por Dio, por la mondo, aŭ por ili ambaŭ. La taskoj, kiujn oni entreprenas por Dio, egalas al tiuj, kiujn entreprenis la sanktuloj, akceptante vivi vivon de anĝeloj en homaj korpoj. Tiuj, kiujn oni entreprenas por la respekto de la mondo, egalas al la agoj pro kiuj oni pasas tra multe da akvo, multe da klimatoj kaj multe da fremdeco ĉe gentoj strangaj, por akiri la tiel nomatajn favorojn de la fortuno. Kaj fine; tiuj, kiujn oni entreprenas por Dio kaj por la mondo kune, egalas al la impeto de kuraĝaj soldatoj, kiuj, apenaŭ tuj perceptante en malamika remparo la precizan spacon, kiun povis malfermi ronda kuglego de la artilerio, metas flanken ĉian formon de timo, sen antaŭa pripenso nek atento al la

videbla danĝero, kiu ilin minacas; kaj, puŝataj en flugo per flugiloj de alta fervoro batali por sia idealo, por sia naĉio aŭ por sia reĝo, ili sin ĵetas maltime tra la svarmo de mil plej diversaj manieroj de morto ilin atendantaj.

Jen estas la taskoj, kiujn regule oni entreprenas, ĉar estas honoro, gloro kaj valoro ilin entrepreni, eĉ kvankam plenaj de multe da baroj kaj danĝeroj; sed tiuj, kiujn vi intencas entrepreni kaj efektivigi, neniel havigos al vi benojn de Dio, favorojn de la fortuno nek respektojn de la homoj; ĉar en okazo de sukceso, kiel vi esperas, vi restos nek pli fiera, nek pli riĉa nek pli digna ol nun vi estas. Kaj, se okazos fiasko, vi dronos en la plej granda mizero, kiun oni povas imagi, ĉar tiam utilos por nenio la konscio, ke oni ne scias pri la okazinta domaĝo; sufiĉos, por vin turmenti kaj aflikti, la fakto ke vi mem pri tio scias. Por konfirmi ĉi tiun veron, mi volas diri al vi stancon, kiun verkis la fama poeto Ludoviko Tansilo, ĉe la fino de la unua parto, en «La larmoj de Sankta Petro», kiu tekstas jene:

Kreskas ja la dolor' kaj kreskas honto
Ĉe Petro, kiam ĵus la tag' montriĝis;
Kvankam neniu plu en la renkonto,
Hontas li tial ke pek' efektiviĝis.
Ĉar sindonema kor' emas al konto
Ne jam nur kiam la konsci' vekiĝis,
Sed plej hontas ĝi, en erarafero,
Pro sola rigard' de ĉiel' kaj tero.

Do, via sekreto ne mildigos vian doloron; sed daŭre vi ploros, se ne larmojn de la okuloj, larmojn el sango de la koro, kiel ploris tiu naiva doktoro pri kiu poeto rakontas, ke li faris provon ĉe glaso, al kio rezignis pli saĝe la prudenta Rejnaldo; kio, kvankam poezia fikcio, gardas moralajn instruojn, kiujn inde oni devas atenti, studi kaj

imiti. Des pli, ke per tio, kion tuj mi diros, fine vi komprenos la grandan eraron, kiun vi intencas fari.

Diru, Anselmo, se la ĉielo aŭ la bona sorto estus farinta vin sinjoro kaj leĝa posedanto de ege pura diamanto, pri kies kvalito kaj karatoj konsentus ĉiuj juvelistoj ĝin vidintaj; kaj, se ili ĉiuj per unuanima voĉo kaj komuna opinio asertus, ke pro kvalito, karatoj kaj konsisto ĝi rangas ĝis la grado, kiun devas atingi la naturo de tiaspeca ŝtono; kaj, se vi mem tion akceptus, sen kontraŭa rimarko, ĉu tiam estus juste, ke jukus ĉe vi la deziro preni tiun diamanton kaj meti ĝin inter amboson kaj martelon, por provi tie per kruda forto de batoj kaj brakoj, ke ĝi estas tiel malmola kaj tiel perfekta, kiel oni asertis? Kaj, ankoraŭ pli, se efektiviĝus la ago, nu, kio? Ĉar en la okazo, ke la ŝtono rezistus al la stulta provo, ne pro tio ĝi gajnus pli da valoro aŭ pli da famo; kaj se ĝi rompiĝus —evento tute ebla— ĉu ne vere, ke ĉio perdiĝus? Jes, plej certe, dum la posedanto restus kiel stultulo, antaŭ ĉies konsidero.

Konsciu, do, amiko Anselmo, ke Kamila estas plej pura diamanto, tiel en via opinio kiel en iu alia, kaj ke estas malsaĝe meti ŝin sub risko de pereo; ĉar kvankam ŝi restos sen difekto, ne pro tio ŝi atingos pli da valoro ol nun ŝi havas. Kaj, se ŝi fiaskus aŭ ne rezistus, konsciu de nun kiel ŝi restos sen sia teniĝo, kaj kiel prave vi plendos kontraŭ vi mem, tial ke vi estis la kaŭzo de ŝia kaj via pereo. Sciu, ke ne ekzistas juvelo en la mondo, tiel valora kiel virino ĉasta kaj honesta, kaj ke la honesteco de virinoj konsistas el la bona opinio, kiun pri ili oni havas; kaj, tial ke tiu pri via edzino altiĝas ĝis la ekstremo, kiun vi jam scias, kial vi volas meti en dubon ĉi tiun veron? Sciu, amiko, ke la virino estas animaleto neperfekta, kaj ke oni ne devas meti antaŭ ŝi baraĵojn per kiuj ŝi stumblos kaj falos; sed oni devas ilin forigi, liberigante al ŝi la vojon je kiu ajn obstaklo, por ke sen ĝenoj iru ŝi vigle atingi la

mankantan perfektecon, kiu konsistas nur el virto.

La naturistoj asertas, ke la ermeno estas besteto kun ege blanka pelto. Kiam oni ĝin volas ĉasi, la ĉasistoj uzas jenan artifikon: sciante la lokojn, kien kutime ĝi iras kaj venas, oni malpurigas ilin per ŝlimo; kaj poste, pelante la beston, oni irigas ĝin al tiaj lokoj. Tuj, kiam la ermeno venas ĉe la ŝlimo, ĝi haltas kaj sin lasas kapti kaj ĉasi, anstataŭ paŝi tra la koto kaj perdi kaj difekti sian blankecon, kiun ĝi estimas pli ol la vivon kaj liberon. Ĉiu virino ĉasta kaj honesta estas ermeno; kaj la virto de la honesteco estas pli pura kaj blanka ol neĝo. Kaj tiu, kiu volas ne perdi ĝin, sed, kontraŭe, ĝin konservi kaj gardi, devas uzi alian rimedon ol tiun, kiun por la ermeno oni uzas; ĉar neniel oni devas meti antaŭ ŝi la koton el donacoj kaj servoj de obstinaj amindumantoj; tial ke, ŝajne, aŭ pli ol ŝajne, ŝi ne havos tiom da povo kaj natura forto por povi per si mem renversi aŭ supervenki tiujn malhelpaĵojn; nepre necese estas forigi ilin, metante antaŭ ŝi la purecon de la virto kaj la belecon, kiun gardas la bona famo. Honesta virino ankaŭ estas kvazaŭ spegulo kun hela senmakula kristalo, kiu tamen riskas malheliĝi kaj makuliĝi per kiu ajn spiro ĝin tuŝanta. Por honestaj virinoj oni devas uzi la manierojn, kiujn oni uzas por la relikvoj: adori ilin, sed ne ilin tuŝi! Oni devas gardi kaj flegi honestan virinon, kiel oni gardas kaj flegas belan ĝardenon kun abundo da floroj kaj rozoj, kies mastro al neniu permesas ĝin promeni aŭ ĝin eluzi; jam sufiĉas, ke de malproksime, kaj el inter la feraj kradoj, oni povas ĝui ĝiajn aromaĵojn kaj belaĵojn. Fine, mi volas diri kelkajn versojn, kiuj ĵus venis al mia memoro, kaj kiujn mi aŭdis en moderna komedio; ŝajnas al mi, ke ili tre oportune rilatas al tio pri kio ni nun traktas. Prudenta maljunulo konsilis al alia, patro de knabino, ŝin reteni, gardi kaj ŝlosi; kaj, inter aliaj vortoj, li diris la jenajn:

Estas vitro la virin'
Sed ŝin elprovu neniam,
Ĉu rompebla tra la sin'
Ĉar verŝajne, jes, por ĉiam...
Kaj, pro facila fendiĝo,
Estus tre malsaĝa ludo
Meti sub glas' al rompiĝo
Ion sen taŭga konkludo.
Laŭ klara jen opinio,
Mirinde ĉiuj ja pravas:
Se Dana' en la mond' ravas,
Tentas or' en pluva strio (*).

Ĉio, kion ĝis nun mi diris al vi, ho Anselmo! nur vin koncernas; oportune estas do jam aŭdi iom da tio, kio al mi konvenas. Kaj, se ĝi fariĝas longa, bonvolu pardoni, ĉar tion postulas la labirinto, kien vi eniris, kaj el kie nun vi volas, pere de mi, eliri.

Vi konsideras min kiel amikon; kaj tamen vi volas preni de mi la honoron; ago, kiu atencas kontraŭ ĉia amikeco. Kaj ne nur tion vi intencas, sed ankaŭ vi deziras, ke mi ĝin prenu de vi. Ke vi volas preni ĝin al mi, estas klare; ĉar kiam Kamila vidos, ke mi ŝin amindumas, kiel vi petas, certe ŝi konsideros min kvazaŭ homon sen honoro nek digno, ĉar mi plenumas kaj celas aferon, kiu situas tute ekstere de tio, al kio mia propra estimo kaj via amikeco devigas. Pri via deziro, ke mi senhonorigu vin, ne estas dubo; ĉar vidante, ke mi ŝin amindumas, Kamila tuj pensos, ke mi rimarkis ĉe ŝi ian frivolecon, kiu kuraĝigis min malkovri miajn malpurajn dezirojn. Kaj, tial ke ŝi atribuos al si malhonoron, apartenos al vi, kiel propra afero, ŝia propra malhonoro. Kaj el tio fluas ĉio, kion ordinare oni babilas

(*) Aludo al helena mito pri la nimfo Danao, kies rifuzojn Jupitero ruze venkis, preninte la formon de sunradio. *(N. de la T.)*

pri la edzo de adulta virino, kvankam nenion li scias nek iel donis okazon por ke lia edzino agu maldece; nek dependis de lia povo, pro neglekto aŭ malmulta gardo, eviti lian malfeliĉon. Malgraŭ tio, oni nomas kaj vokas lin per aĉa nomo de fia insulto; kaj iamaniere oni rigardas lin, sciante la malvirton de lia edzino, per okuloj de rikano anstataŭ distingi lin per tiuj de kompato, antaŭ la konstato ke li troviĝas en tia domaĝo ne pro sia kulpo, sed pro inklino de sia malfidela kamaradino. Tial, mi volas diri la kaŭzon, kial fakte restas sen honoro la edzo de pekema edzino, kvankam nenion li scias pri tio, nek li havis kulpon, nek en io li intervenis aŭ donis okazon por ke ŝi estu tia. Kaj ne laciĝu aŭskultante, ĉar tio bone utilos por via profito.

Kiam Dio kreis nian unuan patron en la surtera Paradizo, laŭ la Sankta Skribo, Dio metis dormon al Adam; kaj, dum la dormo, Li prenis ripon de lia maldekstra flanko, el kio Li formis nian patrinon Eva; Kiam Adam vekiĝis, li ŝin alrigardis kaj diris: *Jen, ĉi tio estas karno el mia karno kaj osto el miaj ostoj.* Kaj Dio diris: *Pro la virino, la viro forlasos sian patron kaj sian patrinon; kaj ili ambaŭ estos unu sama karno.* Tiam fondiĝis la sankta sakramento de la geedzeco, kun tiaj nodoj, ke nur la morto povas malligi ilin. Tiom da povo kaj forto havas tiu mirinda sakramento, ke ĝi ebligas vivi du malsamajn personojn per unu sama karno; kaj, ankoraŭ pli, ĉe la perfektaj geedzoj, ĉar kvankam havante du animojn, ili nur havas unu solan volon. Kaj pro tio oni deduktas, ke, se la karno de la edzino estas sama kun tiu de la edzo, la makuloj aperintaj sur ĝi, aŭ la difektoj, kiujn ĝi akiras, efikas ĉe la karno de la edzo, kvankam li ne donis okazon, kiel dirite, por tia domaĝo. Ĉar, same kiel doloro de la piedo, aŭ de alia parto de la homa korpo, efikas ĉe la tuta korpo, pro tio ke ĉio estas unu sama karno, kaj la kapo sentas la suferon de la maleolo, eĉ ne estante la kaŭzo, ankaŭ la edzo partoprenas

en la malhonoro de la edzino, tial ke li estas unu sama afero kun ŝi.

Kaj, pro tio ke honoroj kaj malhonoroj, en la mondo, estiĝas kaj naskiĝas el karno kaj sango, kaj tiuj de malbona edzino apartenas al tia speco, la edzo nepre devas ricevi parton da ili, garninte sin per malhonoro, eĉ kiam pri tio nenion li scias. Konsciu, do, Anselmo, pri la danĝero al kiu vi iras, dezirante perturbi la kvietecon en kiu via bona edzino vivas; konsciu per kiom vana kaj malprudenta scivolemo vi volas taŭzi la humorojn, kiuj nun ripozas en la brusto de via ĉasta edzino. Atentu, ke vi hazardas gajni malmulte, kaj tiom multe vi riskas perdi, ke mi metas finan punkton, ĉar vortoj mankas al mi por ĝin ankoraŭ pli poluri. Tamen, se ĉio, kion mi diris, ne sufiĉas por liberigi vin de via malsana intenco, serĉu jam alian instrumenton por via malhonoro kaj malfeliĉo, ĉar tiun rolon neniel mi akceptos, eĉ perdante per tio vian amikecon, kio estos la plej granda perdo, kiun mi povas imagi.

Dirinte tion, silentis la saĝa kaj prudenta Lotario; kaj Anselmo restis tiel konfuza kaj enpensa, dum longa daŭro, ke li ne povis respondi vorton; sed, fine, li diris:

—Per la atento, kiun vi vidis, amiko Lotario, mi aŭskultis ĉion, kion vi volis diri; kaj, en viaj rezonoj, komparoj kaj ekzemploj, mi rimarkis vian multan prudenton kaj la gradon de vera amikeco, kiun vi atingas; ankaŭ same, mi komprenas kaj konfesas, ke, se mi ne sekvas vian opinion, irante post la mia, mi fuĝos el la bono, kurante al la malbono. Antaŭ ĉi tiu konkludo, vi devas konsideri, ke mi suferas de la malsano, kiun kutime havas certaj virinoj, kiuj emas manĝi teron, gipson, karbon aŭ aliajn pli strangajn aĵojn, kiuj se naŭzaj por la okuloj, multe pli por la buŝo. Sekve, estas necese uzi artifikon por min kuraci, kaj tion ni povus atingi facile, se vi komencus amindumi Kamilan, eĉ kvankam nur varmete kaj fiktive. Certe, ŝi ne

tiel knedebla estos, por ĵeti teren sian honestecon ĉe la unuaj renkontoj; kaj per ĉi tiu sola komenco, mi restos kontenta kaj vi plenumos ĉion, kio decas al nia amikeco, ne nur redonante al mi la vivon, sed ankaŭ persvadante min ne agi kontraŭ mia honoro. Ĉar, pro unu sola konsidero, vi estas devigata fari tion: sciante, ke mi estas preta, kiel fakte okazas, meti en praktikon ĉi tiun provon, vi ne devas konsenti, ke mi sciigu mian stultaĵon al alia persono, per kio mi metus en riskon la honoron, kiun vi zorgas ke mi ne perdu. Kaj, se la via ne sidos sur ĝusta loko, en la opinio de Kamila, dum vi ŝin amindumos, tio neniel aŭ malmulte gravas; ĉar vidante en ŝi la sintenon, kiun ni atendas, baldaŭ vi povos rakonti al ŝi la puran veron de nia artifiko, per kio via famo reiĝos al sia antaŭa rango. Kaj, se tiom malmulte vi riskos, kaj tiom multe da kontento vi donos al mi en la aventuro, ne rifuzu ĝin entrepreni, eĉ se pliaj malhelpaĵoj staras antaŭe; ĉar, kiel dirite, jam per la komenco mi konsideros finita la aferon.

Vidante la neskueblan obstinon de Anselmo, kaj ne plu sciante kiajn ekzemplojn al li prezenti, nek kiajn rezonojn al li eldiri, por malebligi ĝin sekvi; kaj, vidante ankaŭ, ke li minacis malkovri al aliulo sian malsanan deziron, Lotario, por eviti pli grandan domaĝon, decidis komplezi lin kaj fari tion, kion li petis, kun celo kaj intenco gvidi la aferon laŭ maniero, ke, ne taŭzante la pensojn de Kamila, Anselmo restos kontenta. Sekve, li respondis, ke li diru al neniu sian penson, ĉar li prenos sub sia zorgo tiun entreprenon, kiun li komencos, kiam tio estos al li plej oportune. Anselmo ĉirkaŭprenis lin fervore kaj varme, dankante lian oferon, kvazaŭ oni estus farinta al li plej grandan favoron. Ili interkonsentis komenci la agadon en la sekvanta tago; ĉar li ebligos lokon kaj tempon al Lotario, por ke li povu paroli solece kun Kamila; ankaŭ li havigos monon kaj juvelojn, por doni kaj oferi al ŝi. Li konsilis dediĉi al ŝi

muzikaĵojn, fari versojn je ŝia laŭdo; kaj, se li ne emas havi en tio laboron, li mem faros ilin. Al ĉio konsentis Lotario, kvankam kun intenco tute malsama al tiu pri kiu Anselmo supozis. Post ĉi tiu interkonsento, ili reiris en la domon de Anselmo, kie troviĝis Kamila atendante sian edzon, kun maltrankvilo kaj timo, ĉar en tiu tago li venis pli malfrue ol kutime.

Lotario ekiris al sia domo, kaj Anselmo restis hejme tiel kontenta, kiel enpensa Lotario statis, ne sciante kion fari por sukcesi en tiom malprudenta afero. Sed, tiun nokton li elpensis la manieron, kiun li uzos por trompi Anselmon sen ofendo al Kamila. En la alia tago, li venis por tagmanĝi kun sia amiko, kaj li estis afable akceptata de Kamila, kiu ĉiam akceptis kaj traktis lin tre bonvole, sciante ke ŝia edzo tiel lin estimis. Ili finis manĝi, oni deprenis la tablotukojn kaj Anselmo petis al Lotario restadi tie, kun Kamila, intertempe li foriros al urĝa komisio, ĉar post unu horo kaj duono li revenos. Kamila petis al li ne foriri; kaj Lotario sin proponis por lin akompani, sed nenio taŭgis por Anselmo; kontraŭe, li insistis al Lotario, ke li restu kaj atendu, ĉar poste li devas trakti kun li pri afero tre grava. Ankaŭ li rekomendis al Kamila ne lasi Lotarion sola, ĝis lia reveno. Efektive, tiel lerte li sciis ŝajnigi la necesecon aŭ stultecon de sia foriro, ke neniu povus kredi, ke ĝi estis fiktiva. Foriris Anselmo, kaj restis solaj apud la tablo Kamila kaj Lotario, ĉar la cetera hejma personaro ĵus eliris por tagmanĝi.

Lotario troviĝis, do, en la implikaĵo, kiun lia amiko deziris, kaj fronte al malamiko povanta venki, nur per siaj belegaĵoj, eskadronon da armitaj kavaliroj. Oni jen diru, ĉu ne prava la timo de Lotario! Sed ne alion li faris ol apogi la kubuton sur la brakon de la seĝo, kun malfermita mano ĉe la vango; kaj, petante pardonon al Kamila, pro la malkonvena pozo, li diris, ke li deziras iomete ripozi

ĝis la reveno de Anselmo. Kamila respondis, ke pli bone li ripozus en la vizitĉambro ol en la seĝo, tial ŝi petis liu eniri ĝin por dormi. Lotario ne volis, kaj tie li restis dormante ĝis Anselmo revenis, kiu, trovinte Kamilan en ŝia apartamento kaj Lotarion dormanta, kredis, ke, ĉar tiom multe li malfruis, ili jam havis okazon por paroli kaj eĉ por dormi. Li alsopiris la horon, ke Lotario vekiĝos, por ekiri eksteren kun li kaj demandi pri la aventuro.

Ĉio okazis kiel li volis. Lotario vekiĝis, ili ambaŭ elhejmiĝis kaj rapide li demandis pri tio, kion li deziris. Lotario respondis, ke li ne kredis oportune, jam en la unua fojo, plene malkovriĝi; sekve, ne alion li faris krom tio laŭdi Kamilan, kiel belulinon, dirante al ŝi, ke tra la tuta urbo oni pri nenio parolas, se ne pri ŝia beleco kaj sprito, ĉar ĉi tio ŝajnis al li bona enkonduko por komenci gajni ŝian volon, preparante ŝin aŭskulti lin plezure alian fojon, uzante tiel la artifikon, kiun la demono uzas, kiam li volas trompi iun, kiu situas en observejo por sin gardi. Tiuokaze, la diablo, kvankam estaĵo de mallumo, transformiĝas en anĝelo de lumo; kaj, metante antaŭe belajn ŝajnojn, poste li malkovras sin kaj sukcesas en la intenco, se jam en la komenco oni ne malkovris la trompon. Ĉi tio multe kontentigis Anselmon; kaj li diris, ke ĉiutage li ebligos similan ŝancon, eĉ kvankam ne elirante el la hejmo, ĉar tie li okupos sin pri aferoj en kiuj Kamila neniel povos koni lian artifikon.

Okazis, do, ke pasis multaj tagoj en kiuj Lotario, ne dirante vorton al Kamila, ĉiam respondis al Anselmo, ke li ŝin alparolas kaj neniam sukcesas akiri de ŝi eĉ plej etan specimenon konsenti al io riproĉinda, nek montri signon kun ombro da espero; kontraŭe, ŝi minacis rakonti ĉion al sia edzo, se de tiu malbona intenco li ne liberiĝas.

—Nu, tre bone —diris Anselmo— ĝis nun Kamila rezistis al la vortoj, estas necese jam vidi, kiel ŝi rezistas al la agoj. Morgaŭ mi donos al vi dumil orajn eskudojn, por

Lotario ploris, petegis, promesis...

donaci kaj oferi ilin al ŝi, kaj plian kvanton por aĉeti juvelojn, per kiuj ŝin delogi, ĉar ordinare la virinoj estas inklinaj al tio sin garni por aspekti plaĉe, des pli se ili estas belaj, eĉ kiam plej ĉastaj. Kaj, se fine ŝi rezistas al ĉi tiu tento, mi restos kontenta kaj ne plu vin ĝenos.

Lotario respondis, ke, jam komencinte, li portos ĝis fino la entreprenon, kvankam li atendas eliri el ĝi laca kaj

venkita. La alian tagon, li ricevis la kvarmil eskudojn, kaj kun ili kvarmil konfuzojn, ĉar li ne sciis, kion fari por plu mensogi; sed denove li decidis diri, ke tiom firma restas Kamila antaŭ la promesoj kaj donacoj, kiom antaŭ la vortoj, kaj ke ne estas necese laciĝi plu, ĉar la tutan tempon oni elspezos vane. Sed la sorto, gvidante la aferojn alimaniere, ordonis, ke iun tagon, kiam Anselmo lasis solaj Kamilan kaj Lotarion, kiel jam dum aliaj fojoj, li sin ŝlosis en ĉambro, kie, tra la truoj de la seruro, li rigardis kaj aŭskultis, kion ili ambaŭ intertraktis; kaj li vidis, ke, dum pli ol duonhoro, Lotario ne parolis vorton al Kamila; kaj certe li ĝin ne parolos eĉ dum jarcento. Tiam li venis al la konkludo, ke ĉio estis fikcio kaj mensogo, kion lia amiko rakontis pri la respondoj de Kamila. Kaj, por konstati ĉu efektive tiel, li eliris el la ĉambro kaj vokis aparte Lotarion, demandante lin kiaj novaĵoj estas kaj en kia animstato Kamila troviĝas. Lotario respondis, ke li ne ŝatas plu strebi en ĉi tiu afero, ĉar tiel severe kaj rifuzeme ŝi reagas, ke neniel li havos kuraĝon por diri al ŝi denove ion ajn.

—Ha! —ekdiris Anselmo— Lotario, Lotario, kiel malfidele vi reciprokas en tio, kio al mi decas, aŭ en tio je kio tiel multe mi fidas al vi! Ĵus mi observadis vin tra la spaco, kiun ebligas la enirejo de ĉi tiu ŝlosilo, kaj mi vidis, ke nek vorton vi diris al Kamila, el kio mi deduktas, ke la unuaj vortoj diritaj al ŝi ankoraŭ estas dirotaj; kaj se tio estas tiel, kiel fakte ĝi estas, kial vi min trompas? aŭ kial vi volas forpreni per via malico la rimedojn, kiujn mi povus trovi por atingi mian deziron?

Nenion plu diris Anselmo, sed sufiĉa estis ĉi tio dirita por lasi Lotarion konfuza kaj honta. Konsiderante kvazaŭ ofendon al sia honoro, ke oni trovis lin en mensogo, li ĵuris al Anselmo, ke, ekde tiu momento, li akceptas tiel fervore la taskon kontentigi lin tute sen mensogoj, kiel li vidos se scivoleme lin spionos, kvankam ne estos necese uzi tian

rimedon, ĉar tiu, kiun li aplikos por lin komplezi, liberigos lin de ĉia suspekto. Anselmo kredis al li; kaj, por havigi al li eblojn pli taŭgajn kaj malpli hazardajn, li decidis foresti ok tagojn el sia hejmo, venante ĉe amiko sia, kiu loĝis en vilaĝo, ne malproksime de la urbo. Kun tiu amiko li interkonsentis, ke urĝe oni voku lin, por havi motivon antaŭ Kamila pri la foriro.

Ho, ve al vi, kompatinda kaj malprudenta Anselmo! Kion vi faras? Kion vi celas? Kion vi postulas? Pensu, ke vi agas kontraŭ vi mem, skizante vian malhonoron kaj trudante vian pereon. Bona estas via edzino Kamila; kviete kaj ripoze vi ŝin posedas; nenio ĝenas vian guston; ŝiaj pensoj ne eliĝas el la muroj de ŝia domo; vi estas ŝia ĉielo sur la tero, la idealo de ŝiaj deziroj, la plenpleno de ŝiaj gustoj kaj la mezurilo per kiu ŝi mezuras sian volon, plene alĝustigante ĝin kun la via kaj kun tiu de la ĉielo. Nu, se la mino de ŝia honoro, beleco, honesteco kaj sindetenemo liveras al vi sen peno la tutan riĉon, kiun ĝi havas kaj vi povas deziri, kial ankoraŭ vi volas elfosi la teron kaj serĉi novajn vejnojn de nova neniam trovita trezoro, metante vin en la danĝeron, ke ĉio renversiĝu, ĉar fakte ĉio kuŝas sur la malfortaj apogoj de ŝia delikata naturo?! Konsciu, do, ke al tiu, kiu serĉas la neeblaĵojn, prave oni rajtas neadi la eblaĵojn, kiel tre bele kantis poeto dirante:

Vivon mi serĉas en morto,
Meze de malsano sanon,
En karcer' liberan manon,
Forkuron preter la forto
Kaj en perfido lojalon.
Sed la sorto, tro banala,
Pro decido plej fatala
Kun ĉiel' interkonsentis,
Ke la ebl' estu sen eblo
Ĉar al neeblo mi tentis.

Alian fojon reiris Anselmo al la vilaĝo, antaŭe dirinte al Kamila, ke, dum la tempo de lia foriro, Lotario venos zorgi pri la domo kaj manĝi kun ŝi; sekve, ŝi klopodos trakti lin, kvazaŭ sian propran personon. Kamila afliktiĝis, kiel virino diskreta kaj honesta, pro la ordono, kiun ŝia edzo trudis. Tial, ŝi avertis lin, ke al neniu estas dece, sen lia ĉeesto, okupi seĝon ĉe lia tablo; kaj, se tion li decidis pro ne sufiĉa konfido al ŝia kapablo mastrumi la hejmon, ke li provu ĉi tiun fojon, kaj li vidos per sperto, ke por pli gravaj zorgoj ankaŭ ŝi taŭgas.

Anselmo rediris, ke tio estas lia volo, kaj nenion ŝi devas fari krom klini la kapon kaj lin obeadi. Kamila respondis, ke tiel ŝi agos, kvankam kontraŭvole. Foriris Anselmo, kaj en la alia tago venis Lotario al lia domo, kie Kamila akceptis lin kun afabla kaj honesta bonvolemo; sed neniam ŝi situis en lokoj, kie Lotario povu vidi ŝin sola, ĉar ĉiam ŝi troviĝis ĉirkaŭata de servistoj kaj servistinoj, precipe de iu ĉambristino nomata Leonela, kiun ŝi multe estimis, ĉar, de kiam infanoj, ili ambaŭ kune kreskis ĉe la gepatroj de Kamila; kaj, edziniĝinte kun Anselmo, ŝi kunprenis ŝin.

Dum la tri unuaj tagoj, Lotario nenion diris al Kamila, kvankam li povus, kiam oni retiris la tablotukojn aŭ kiam la geservistoj foriris por tagmanĝi, kiel eble plej rapide, ĉar tion Kamila ordonis al ili. Eĉ Leonela ricevis ordonon manĝi pli frue ol Kamila kaj neniam eliĝi el ŝia flanko. Tamen, la servantino, kiu en aliaj aferoj, pli logaj al siaj preferoj, dediĉis la pensojn kaj bezonis la horojn, kun ties spaco, por flegi siajn inklinojn, ne plenumis akurate la ordonon de sia sinjorino, sed ofte ŝi lasis ilin solaj, kvazaŭ oni estus ordoninta tion al ŝi. Tamen, la nobla figuro de Kamila, la sereneco de ŝia vizaĝo kaj la sinteno de ŝia persono estis tiaj, ke ili metis bremson al la lango de Lotario. Sed la profito, kiun la multaj virtoj de Kamila liveris, trudante silenton al la lango de Lotario, efikis tre malbone

por ili ambaŭ; ĉar se la lango silentis, la pensoj fluadis kaj havis okazon konstati, de loko al loko, la ekstremoju de boneco kaj beleco, kiujn Kamila posedis, sufiĉaj por enamigi statuon el marmoro kaj ne nur koron el karno.

Lotario ŝin rigardadis dum la daŭro de tempo, kiu eblis por ŝin alparoli, kaj li konsideris kiel multe ŝi estas aminda. Ĉi tiu konsidero, iom post iom, komencis alsalti la respektojn, kiujn por Anselmo li gardis; kaj mil fojojn li intencis foriri de la urbo por ekiri tien, kie neniam Anselmo lin vidos nek ankaŭ li vidos Kamilan; sed jam starigis baron kaj haltigis lin la plezuro, kiun li ĝuis nur ŝin rigardante. Li admonis sin kaj mem kverelis kun si, por rifuzi kaj ne senti la inklinon, kiu puŝis lin rigardi ŝin. Li troviĝis kulpa pro sia deflankiĝo; li alnomis sin mallojala amiko kaj eĉ malbona kristano; li faris konkludojn kaj ankaŭ komparojn inter si kaj Anselmo, kaj ĉiuj venis al la aserto, ke pli granda estis la frenezo kaj stulteco de Anselmo ol lia malmulta fideleco; sekve, havante senkulpigojn, tiel antaŭ Dio kiel antaŭ la homoj, pri tio, kion li intencas fari, neniel li timis atendi punon pro tia kulpo.

Efektive, la beleco kaj boneco de Kamila, kune kun la ŝanco, kiun la stulta edzo metis en liajn manojn, ĵetis teren la lojalecon de Lotario; kaj, sen atento al alia celo, krom tiu al kiu lia emo puŝis, post tri tagoj, de kiam Anselmo forestis, dum kiuj li strebis en daŭra batalo, por rezisti al siaj deziroj, li komencis amindumi Kamilan, kun tiom da fervoro kaj per tiel amoplenaj vortoj, ke Kamila restis tute konfuza. Ŝi ne alion faris ol leviĝi de kie ŝi sidis, enirante en sian apartamenton sen respondi vorton. Sed, ne pro tia malvarmo velkis ĉe Lotario la espero, kiu ĉiam floras apud la amo, ĉar ankoraŭ pli li sopiris al Kamila, kiu, rimarkinte ĉe Lotario tion, kion ŝi neniam povis imagi, ne sciis kion fari; kaj opiniante, ke ne estas afero sekura, nek ankaŭ konvena, doni okazon aŭ eblon por ke plian fojon li ŝin

alparolu, ŝi decidis komisii en tiu sama vespero unu el siaj servistoj kun bileto al Anselmo, kie ŝi skribis la jenajn vortojn :

«Same kiel oni kutime diras, ke malbone aspektas la armeo sen sia generalo, kaj la kastelo sen sia kastelestro, mi diras, ke multe pli malbone aspektas juna edziniĝinta virino sen sia edzo, kiam ne malhelpas plene pravigitaj motivoj. Mi statas tiel malagrable sen vi, kaj tiel embarase, ne povante elteni vian foreston, ke, se baldaŭ vi ne revenos, mi bezonos iri por min distri al la domo de miaj gepatroj, kvankam restos la via sen gardo ; ĉar la gardanto, kiun vi lasis, se li restis kun tia titolo, laŭ mia opinio, zorgas pli por sia gusto ol por tiu, kiu vin koncernas ; kaj, ĉar diskreta vi estas, nenion plu mi devas diri, nek estus bone alion plu ankoraŭ diri.»

Ĉi tiun leteron ricevis Anselmo ; kaj per ĝi li komprenis, ke Lotario jam komencis la entreprenon kaj ke Kamila ĝuste reagas tiel, kiel li deziras. Do, supermezure ĝoja pro tiaj sciigoj, li respondis parole al Kamila, ke je nenia maniero ŝi faru loĝŝanĝon, ĉar li revenos tre baldaŭ. Perpleska iĝis Kamila pro la respondo de Anselmo, kiu metis ŝin en pli da konfuzo ol antaŭe, ĉar ŝi ne kuraĝis resti hejme nek, multe malpli, iri al siaj gepatroj, ĉar en la restado riskos danĝeron ŝia honesteco, sed en la foriro ŝi agos kontraŭ la ordono de sia edzo. Fine, ŝi decidiĝis al tio plej malbona, kio estis restadi, kun la intenco ne eviti la ĉeeston de Lotario, por ne ebligi klaĉojn ĉe la geservistoj ; jam ŝi eĉ bedaŭris esti skribinta tion, kion ŝi skribis al sia edzo, pro timo ĉu li pensos, ke Lotario rimarkis ĉe ŝi ian frivolecon, kiu incitis lin ne gardi al ŝi la respekton, kiun ŝi meritas. Tamen, fidante al sia virto, ŝi fidis al Dio kaj al sia bona volo, per kiu ŝi intencis rezisti, silentante pri ĉio, kion Lotario volos diri. Nenion plu dirante al sia edzo,

por ne impliki lin en kverelojn aŭ zorgojn, ŝi ankaŭ serĉadis la manieron senkulpigi Lotarion antaŭ Anselmo, kiam li demandos pri la kaŭzo, kiu instigis ŝin skribi tiun paperon. Kun tiaj pensoj, pli boncelaj ol efikaj aŭ profitaj, ŝi estis plian tagon aŭskultanta Lotarion, kiu tiel forte ŝarĝis la premon, ke ekŝanceliĝis la firmeco de Kamila, kies honesteco havis multon por fari en la okupo regi la okulojn, por ke ili ne donu elmontrojn de la ama kompato, kiun la larmoj kaj vortoj de Lotario vekis en ŝia brusto. Ĉi tion rimarkis Lotario, kaj ĉi tio lin flamigis. Fine, ŝajnis al li necese en la spaco kaj tempo, kiujn ebligis la foresto de Anselmo, elpremi la sieĝon al la citadelo; sekve, li ekatakis ŝian reziston per laŭdoj al ŝia beleco, ĉar nenio alia submetas kaj venkas pli rapide la kastelajn turojn de la vantemo de ĉiuj belulinoj, ol ĉi tiu vantemo mem sur langoj de la flatado. Efektive, per sia tuta diligento, li minis la rokon de ŝia kontraŭstaro per tiaj materialoj, ke se Kamila estus masive farita el bronzo, ankaŭ ŝi estus falinta teren.

Lotario ploris, petegis, promesis, flatis, insistis kaj afektis kun tiom da emocio, kun elmontroj de tiom da vero, ke li renversis la singardemon de Kamila, sukcesinte en tio, kion li ne esperis kvankam multe deziris. Submetiĝis Kamila; jes, Kamila submetiĝis! Sed, kio, do, se la amikeco de Lotario ankaŭ ne restis sen difekto? Jen klara ekzemplo por montri, ke nur evitante ĝin oni venkas la aman pasion; tial neniu devas lukti kontraŭ tiel potenca malamiko, ĉar estas necesaj diaj fortoj por venki la ĝiajn, homajn. Nur Leonela sciis la cedon de sia sinjorino, ĉar tion ne povis kaŝi al ŝi la du malfidelaj geamikoj kaj novaj geamantoj. Lotario ne volis malkovri al Kamila la artifikon de Anselmo; ankaŭ ne ke li donis okazon por atingi tiun punkton, por ke ŝi ne taksu malalte lian amon opiniante, ke hazarde aŭ senpripense, kaj ne intence, li ŝin amindumis.

Post malmultaj tagoj, Anselmo revenis al sia hejmo, kaj

li ne rimarkis, ke tie io mankis, kion malbone li gardis, kvankam tre multe li estimis. Tuj li iris viziti Lotarion, kaj li trovis lin hejme; ili sin ĉirkaŭbrakis, sed urĝe li demandis pri la sciigoj por sia vivo aŭ por sia morto.

—La sciigoj, kiujn mi povas doni al vi, ho amiko Anselmo! —diris Lotario— atestas, ke vi posedas tiun edzinon, kiu inde povas esti krono kaj ekzemplo por ĉiuj dignaj virinoj. La vento forblovis la vortojn, kiujn mi al ŝi diris; la oferojn ŝi taksis malalte; la donacojn ŝi ne akceptis; pri kelkaj fiktivaj larmoj miaj, ŝi faris videblan mokon. En konkludo, same kiel Kamila estas resumo de ĉia beleco, ankaŭ ŝi estas arkivo, kie troviĝas la honesteco kaj floras la prudento kun la singardemo kaj ĉiuj virtoj, kiuj povas igi laŭdinda kaj plene enviinda ĉiun honestan virinon. Reprenu, do, amiko, viajn monerojn, kiuj jen ĉi tie estas, ĉar mi bezonis preni nek unu el ili, tial ke la energio de Kamila ne submetiĝas al tentoj tiel trivialaj, kiel estas donacoj aŭ promesoj. Kontentiĝu, Anselmo, kaj ne obstinu fari pli da provoj ol tiuj jam faritaj; sekve, se kun seka piedo vi surpasis la maron da malfacilaĵoj kaj suspektoj, kiujn pri la virinoj oni povas aŭ devas havi, ne deziru naĝi denove en la profunda oceano da novaj malhelpaĵoj, nek deziru fari ekzercojn kun alia piloto pri la taŭgeco aŭ fortikeco de la ŝipo, kiun la ĉielo laŭ sorto donis al vi por ke, pere de ĝi, vi trairadu la maron de ĉi tiu mondo. Sed konsciu, ke vi jam ripozas en sekura haveno, alfiksiĝu per la ankroj de la bona reputacio kaj lasu vin luli, ĝis oni venos rememorigi vin pri la ŝuldo, al kies pago neniu homa hierarkio povas sin ekskuzi.

Anselmo restis ege kontenta antaŭ la vortoj de Lotario, ĉar ilin li kredis kvazaŭ diritaj de orakolo; tamen, malgraŭ tio, li petis ne forlasi ankoraŭ la entreprenon, eĉ se nur pro scivolo kaj distro, kvankam ne uzante de nun estontece tiel insistajn klopodojn, kiel ĝis tiam, ĉar li volas nur, ke

li verku kelkajn versojn ŝin laŭdantajn sub la nomo Klori; kaj li donos informon al Kamila, ke li enamiĝis je sinjorino, kiun li garnas per tia nomo, por povi ŝin prikanti kun la dececo konvena al ŝia honesteco; kaj, se okaze Lotario ne emas ŝarĝi sin per la laboro fari tiajn versojn, li mem ilin faros.

—Tio ne estos necesa —diris Lotario— ĉar la muzoj ne tiel malamikas al mi, por ne viziti min kelkfoje dum la jaro. Diru al Kamila tion, kion vi elpensis por ŝajnigi mian amon, sed la versojn mi faros; kaj ili estos, se ne tiel belaj kiel la subjekto meritas, almenaŭ tiel bonaj kiel mi povos.

Al tia interkonsento venis la malprudenta edzo kun la perfida amiko. Revene en sia hejmo, Anselmo demandis al Kamila pri tio je kio ŝi jam miris, ke li ankoraŭ ne demandis: t. e. ke ŝi diru pri la kaŭzo, kiu devigis ŝin skribi la bileton, kiun ŝi al li sendis. Kamila respondis, ke ŝajne Lotario rigardis ŝin iomete pli senĝene ol kiam li troviĝis hejme; tamen, ŝi jam trankviliĝis, kredante, ke ĉio estis nur supozo, ĉar Lotario evitas nun vidi ŝin kaj resti sola kun ŝi. Anselmo diris, ke vere ŝi devas esti certa pri tia konvinko ĉar li scias, ke Lotario estas enamiĝanta al iu altranga fraŭlino el la urbo, kiun li gloras sub la nomo Klori; kaj eĉ sen tia enamiĝo, nenion ŝi devas timi pro la ĉeesto de Lotario, nek pro ilia multa amikeco. Se Kamila ne estus jam avertita de Lotario, ke tiu amo al Klori estas fiktiva, kaj ke tion li mem rakontis al Anselmo, por povi dediĉi kelkajn momentojn al tiuj samaj laŭdoj por Kamila, ŝi estus certe falinta en la malesperigan reton de la ĵaluzoj. Sed estante avertita, ŝi eltenis tiun incidenton sen ĉagreno.

Alian tagon, kiam ili tri sidis ĉetable, Anselmo petis al Lotario reciti ion el tio, kion li komponis por sia amatino Klori, ĉar tial ke Kamila ne konas ŝin, li povos diri kion ajn laŭvole.

—Kvankam ŝi estus konata —respondis Lotario— nenion mi vualus, ĉar kiam amanto laŭdas sian amatinon, kiel belulinon, aŭ ŝin riproĉas kvazaŭ kruelulinon, nenian ofendon li faras al ŝia bona reputacio; sed flanke de tio, mi nur povas diri, ke pri la sendankemo de tiu Klori, hieraŭ mi faris soneton, kiu tekstas jene:

SONETO

Kiam, en mezo de nokta silento,
Dormo tre dolĉa la homojn karesas,
Al ĉiel' kaj al Klori mi adresas
Nur plenan veon de mia korsento.
Kaj poste, kiam la suno sin montras
Ĉe orienta kaj roza la pordo,
Tuj per sopiroj aŭ plendoj sen ordo
Al jam malnova ĉagreno mi frontas.
Sed, kiam ĵetas de sur tron' steloza
Brilajn radiojn la sun' al la tero,
Kreskas la plor' en angor' pro la pento
Ĉar nokto venos kun plend' serioza
Por daŭre vidi, en mia sufero,
Ke surdas Klori kaj ĉiel' sen atento.

La soneto ŝajnis bona al Kamila, sed ankoraŭ pli bona al Anselmo, ĉar li ĝin laŭdis dirante, ke tro kruela estas tiu virino, kiu ne reciprokas tiel klarajn atestojn.

Kamila diris tiam.

—Ĉu efektive estas vera ĉio, kion la enamiĝantaj poetoj asertas?

—Kiel poetoj, ili troigas —respondis Lotario— sed kiel enamiĝantoj, ili ĉiam restas tiom moderaj, kiom verdiraj.

—Pri tio ne ekzistas dubo —rediris Anselmo nur por apogi kaj fidindigi la pensojn de Lotario ĉe Kamila, kiu tiel senscia estis pri la artifiko de Anselmo, kiel jam enamiĝanta al Lotario.

Tial, pro la plaĉo, kiun ŝi havis al liaj aferoj, sciante, krome, ke liaj pensoj kaj skribaĵoj nur ŝin celas, kaj ke ŝi mem estas ja la vera Klori, ŝi petis, se alian soneton aŭ aliajn versojn li scias, ke li bonvolu ilin diri.

—Jes, alian mi scias —respondis Lotario— sed mi kredas, ke ĝi ne estas tiel bona kiel la unua; aŭ, pli trafe dirite, malpli malbona. Tamen, vi povos juĝi, ĉar jen ĝi estas:

SONETO

Plej certe mortos mi, sed estos jam
Ne pli certa la mort' ol la konstato
Fali —ho, belulin'!— en morta stato
Antaŭ vi pro ador' al via am'.
Loĝados mi en mond' de l'forges'
Sen vivo, sen glor', sen ia favoro.
Sed restos en kor' kun mia fervoro
Skulptita via vizaĝ' por kares'.
Tia relikvo, en okaz' angora,
Estos emblemo nur de mia obstin'
Kreskanta pli kaj pli pro rigor' via.
Ĉar ve al la navigant' sub fora
Ĉiel', tra nigra mar', survoje al fin',
Kie atendas lin haven' nenia.

Ankaŭ laŭdis Anselmo ĉi tiun duan soneton, kiel li laŭdis la unuan, kompletigante tiel —ĉeneron post ĉenero— la katenon per kiu sin nodis kaj ligis lia malhonoro, ĉar ju pli Lotario lin senhonorigis, des pli honorinda li sin konsideris. Laŭ tio, ĉiuj ŝtupoj, kiujn Kamila malsupreniris al la fundo de sia malŝatindeco, kondukis ŝin —en la opinio de ŝia edzo— al la pinto de la virto kaj bona famo. Okazis tiutempe, unu fojon inter aliaj, ke, troviĝante sola kun sia ĉambristino, Kamila diris:

—Hontigita mi estas, amikino Leonela, konsciante kiel malalte mi sciis min taksi, ĉar mi ne zorgis por ke almenaŭ

per la tempo Lotario estu aĉetinta la plenan posedon de mia tuta volo, kiun tiel rapide mi donis al li. Mi timas do, ke li malestimos mian facilecon aŭ rapidecon, ne kalkulante la multan premon, kiun li al mi faris por ke mi ne povu rezisti al li.

—Tio neniel vin ĝenu, sinjorino mia —respondis Leonela— ĉar tio, kion oni donas rapide, ne influas nek efikas por malaltigi la estimon, se efektive la donitaĵo estas bona kaj per si mem estiminda. Eĉ oni kutime diras, ke tiu, kiu rapide donas, dufoje donas.

—Ankaŭ oni kutimas diri —diris Kamila— ke oni tion malmulte estimas, kio malmulte kostas.

—Tiu onidiro ne koncernas vin —respondis Leonela— ĉar la amo, kiel mi aŭdis diri, foje flugas kaj alifoje rampas; kun tiu ĝi kuras, kaj kun ĉi tiu testude ĝi paŝas; unujn ĝi malvarmigas, kaj aliajn ĝi forbruligas; unujn ĝi vundas, kaj aliajn ĝi mortigas; en unu sama punkto komenciĝas la kurado de ĝiaj deziroj, kaj en tiu sama punkto ĉio finiĝas kaj likvidiĝas; matene ĝi sieĝas fortikaĵon, kaj vespere ĉi tiu jam submetiĝis, ĉar nenia forto ekzistas por rezisti antaŭ ĝi. Tial do, kion vi timas aŭ kio vin timigas sciante, ke same okazis ĉe Lotario, kiam la amo uzis la foreston de mia sinjoro, kiel instrumenton por vin submeti? Ĉar, dum tiu daŭro, nepre devis efektiviĝi tio, kion la amo antaŭe decidis, ne donante tempon al la tempo de Anselmo, ke li povu reveni por difekti, per sia ĉeesto, la perfektecon de la verko. La oportuneco estas la plej bona peranto, kiun la amo havas por atingi siajn celojn; kaj de la oportuneco ĝi profitas en ĉiuj siaj agoj, precipe dum la komenco.

Ĉi tion mi scias tre bone, pli pro sperto ol pro aŭdo; kaj pri tio mi jam rakontos al vi, sinjorino, ĉar ankaŭ mi konsistas el karno kaj juna sango. Des pli, bela Kamila, ke vi ne vin fordonis aŭ vin oferis tiel rapide; ĉar unue vi vidis en la okuloj, en la sopiroj, en la petoj, en la promesoj

kaj en la donacoj de Lotario lian tutan animon, vidante en ĝi kaj en liaj kvalitoj, kiel inda li estas je via amo. Se tiel situas la faktoj, ne maltrankviligu vian imagon per skrupulaj kaj banalaj konsideroj; sed funde konvinkiĝu, ke Lotario estimas vin, same kiel vi estimas lin; vivu do vi en ĝojo kaj plaĉo pro tio, ke, falinte en la aman kaptilon, tiu, kiu vin kaptis, apartenas al valora kaj ŝatinda speco, kie rendevuas ne sole nur la kvar SS (*), kiujn laŭdire devas posedi la bonaj enamiĝantoj, sed kompleta tuta A B C; bonvolu aŭskulti, kaj vi konstatos, ke mi scias ĝin parkere; Lotario estas, kiel mi deduktas, laŭ mia opinio: *afabla, bona, certa, donacema, enamiĝema, firma, gaja, ĝentila, honorinda, influa, juna, klera, lojala, milda, nobla, obstina, precipa, riĉa,* kaj la SS diritaj, poste *talenta,* kaj *verdira;* la U ne konvenas, ĉar ĝi estas obtuza litero; la Ŭ tro parencas; kaj la Z, *zorgema* al via honoro (**).

Ridis Kamila pro la A B C de sia ĉambristino, konsiderante ŝin pli sperta en amaj aferoj ol ŝi diris, kiel poste ŝi konfesis, rakontante al Kamila, ke ŝi amrilatas kun bondevena junulo el la sama urbo. Antaŭ ĉi tio maltrankviliĝis Kamila, timante, ke, ĝuste sur tiu vojo, devos elteni riskojn ŝia honoro. Ŝi pridemandis ŝin, ĉu tiaj rilatoj pasis al io plia; kun malmulte da honto kaj multe da malembaraso, ŝi respondis, ke ili al tio jam pasis, ĉar konata estas la aserto, ke la neglektoj de la mastrinoj forigas la honton de la servistinoj, kiuj, vidante la stumblojn de siaj sinjorinoj, tute neniel hezitas mem lami sen atento, ke oni pri tio

(*) Kvar adjektivoj kun litero S en la komenco, kiel karakterizaj ecoj de perfekta amanto, laŭ la tiutempaj virinoj. Fidele, en Esperanto oni povas traduki tiujn kvar vortojn, kiuj estas jenaj: SAGA, SOLA, SERVEMA kaj SEKRETA.

(**) En la originalo, kompreneble, ĉi tiu kolekto estas ordigita laŭ la hispanlingva alfabeto. En la traduko, mi zorgis adapti al la tuta serio la esperantan alfabeton, esceptante intence kelkajn literojn, kiuj ankaŭ estas ignorataj en la originalo. *(N. de la T.)*

scios. Kamila nenion povis fari krom peti al Leonela, ke ŝi diru nenion pri ŝia afero al tiu sia kvazaŭa amanto, kaj ke ŝi flegu siajn amaĵojn en sekreto, por ke ili ne fariĝu sciaĵo de Anselmo aŭ de Lotario.

Leonela promesis agi tiele; sed ŝi plenumis tion laŭ maniero, ke fariĝis fakto la timo de Kamila, ke sur tiu vojo difektiĝos ŝia reputacio. La senhonta kaj aŭdaca Leonela, tuj post kiam ŝi vidis, ke la konduto de sia mastrino ne rangis kiel kutime, kuraĝis meti kaj enŝovi en la domon sian amanton pro la fido, ke kvankam la sinjorino lin vidos, ŝi ne riskos malkovri lin. Ĉi tiun domaĝon, inter aliaj, trenas la pekoj de la sinjorinoj, kiuj fariĝas sklavinoj de siaj propraj servistinoj kaj devas kovri iliajn malhonestaĵojn aŭ malnoblaĵojn, kiel okazis al Kamila, kiu, rimarkinte unu kaj plurajn fojojn, ke Leonela troviĝas kun sia dorlotanto en ĉambro de la domo, ne kuraĝis ŝin admoni sed ebligis ŝancojn por enirigi lin, forigante ĉiujn malhelpojn, por ke ŝia edzo ne povu lin vidi; tamen, ŝi ne sukcesis en ĉio, ĉar foje Lotario vidis lin eliri el la domo, ĉe vekiĝo de la aŭroro. Antaŭ tio, ne konante lin, li pensis unue, ke temas pri fantomo; sed kiam li vidis lin paŝi, enmanteliĝi kaj foriri kun zorgo kaj singardo, li deiĝis de sia naiva penso kaj trafis alian, kiu povus esti kaŭzo por ĉies pereo, se Kamila ne trovus la rimedon.

Lotario pensis, ke tiu viro, kiun li vidis eliri tiel ekstertempe el la domo de Anselmo, ne eniris tien por Leonela, nek iel li memoris ĉu ia Leonela ekzistas en la mondo. Li kredis nur, ke Kamila ankaŭ estis same facila kaj frivola por aliulo, kiel ŝi estis por li; ĉar tiaj sekvoj nature aperas en la perfido de ĉiu perfida edzino, kiu perdas la krediton de sia honorindeco, eĉ por tiu mem al kiu ŝi sin fordonis, post petegoj kaj persvadoj; ĉar oni kredas, ke ankoraŭ pli facile ŝi fordonas sin al aliaj, kaj oni asignas absolutan fidon al kiu ajn suspekto, en rilato kun tio. Ŝajne,

en ĉi tiu punkto, tute mankis al Lotario lia klara komprenemo, kaj forglitis el lia memoro ĉiuj liaj saĝaj konsideroj; ĉar atentante nenion, kio estus prudenta —aŭ almenaŭ oportuna— sen tio nek alio, senpacienca kaj blinda pro la furioza ĵaluzo, kiu rodis lian internaĵon, li venis ĉe Anselmo, antaŭ ol ĉi tiu ellitiĝis; kaj, avidante sin venĝi je Kamila, kiu per nenio lin ofendis, li diris:

—Sciu, Anselmo, ke jam de multaj tagoj mi baraktas kun mi mem, penante trovi fortojn por ne diri al vi tion, kion plu kaŝi ne estas eble nek juste. Sciu do, ke la fortikaĵo de Kamila jam submetiĝis, preta al ĉio, kion mi volos fari. Se longe mi prokrastis malkovri al vi ĉi tiun veron, tio estis por konstati ĉu temas nur pri simpla kapriceto ŝia aŭ ago por provi min, celante scii ĉu estas ludata kun firma intenco la amindumo, kiun al ŝi mi entreprenis, kun via konsento. Cetere, laŭ mia opinio, se ŝi estus tia, kia ni ambaŭ supozis, jam ŝi estus sciiginta vin pri mia insistado; sed vidante, ke al tio ŝi malfruas, mi deduktas, ke estas veraj la promesoj, kiujn ŝi faris al mi, ke kiam refoje vi forestos el via hejmo, ŝi akceptos min en la saloneto, kie troviĝas la kolekto de viaj juveloj —kaj vero estas, ke tie kutime Kamila parolis kun li—. Tamen mi ne volas, ke senpripense vi rapidu fari venĝon, ĉar la peko ankoraŭ ne estas plenumita, se ne en la penso, kaj povus okazi ke, de nun ĝis la momento ĝin efektivigi, ŝanĝiĝus la ideo de Kamila kaj, anstataŭe, naskiĝus pento. Konsekvence, tial ke ĉiam vi sekvis miajn konsilojn, entute aŭ parte, atentu kaj sekvu nun tiun, kiun tuj mi diros, por ke sen eraro aŭ sen hezitema animo vi kontentigu vin en ĉio, kion vi konsideros plej konvena: Ŝajnigu foreston por du aŭ tri tagoj, kiel jam alifoje, kaj zorgu laŭ ia maniero resti kaŝe en via saloneto, ĉar la tieaj tapiŝoj kaj aliaj objektoj, per kiuj vi povos vin kovri, ebligos al vi multe da oportuneco. Tiam vi rigardos per viaj propraj okuloj —kaj mi per la miaj— kion celas Ka-

mila. Kaj se ĝi estas la perfido, kiun ni devas timi pli ol atendi, vi mem povos esti kun silento, sagaco kaj diskreto, la ekzekutanto de via ofendiĝo.

Perpleksa, konfuza kaj mira restis Anselmo antaŭ la vortoj de Ŀotario, kiuj frapis lin en la tempo, kiam absolute li ne atendis ilin aŭdi, ĉar li jam komencis ĝui la gloron de la venko, pro la konsidero ke Kamila iĝis venkantino de la fiktivaj atakoj de Ŀotario. Silenta li estis dum longa daŭro, rigardante la plankon, sen movi eĉ la okulharojn, ĝis fine li diris :

—Tiel vi agis, Ŀotario, kiel mi esperis de via amikeco ; en ĉio mi sekvos vian konsilon. Faru kion ajn laŭvole kaj gardu ĝin sekrete, kiel vi juĝos plej konvene en okazo tiel neatendita.

Ŀotario promesis tion ; sed, disirinte, li multe pentis pro ĉio, kion ĵus li diris, ĉar tiam li konsciis, ke plej stulte li agis, tial ke li povus sin venĝi je Kamila laŭ alia vojo ne tiel kruela kaj fia. Ŀi malbenis sian malsaĝon, riproĉis sian facilan senpripenson kaj tute ne sciis, kiun rimedon preni por senplektigi la plektaĵon, aŭ por doni al ĝi oportunan solvon. Fine, li decidis rakonti ĉion al Kamila ; tial ke loko ne mankis por tio, li trovis ŝin sola dum la sama tago ; kaj tuj, kiam ŝi povis lin alparoli, ŝi diris :

—Sciu, amiko Ŀotario, ke mi havas suferon ĉe la koro, kiu premas tiel forte, kvazaŭ ĝi volus krevi interne de la brusto, kaj mirinde estos se tio ne okazos, ĉar la senhonteco de Ŀeonela venis al la ekstremo, ke ĉiunokte ŝi enirigas ian amanton sian en ĉi tiun domon, kie li restas kun ŝi ĝis la tagiĝo, tiom koste kontraŭ mi famo, kiom longe vastiĝos la kampo por ebligi juĝon al ĉiu, kiu vidos lin eliri el mia hejmo je horo tiel nekutima. Sed kio plej multe min ĝenas, estas la fakto ke mi ne povas ŝin puni nek admoni, ĉar ŝi fariĝis sekretariino de niaj rilatoj, kio metas

bremson al mia buŝo por prisilenti la ŝiajn; kaj mi timas, ke de tio naskiĝos malbona okazaĵo.

En la komenco, kiam Kamila tiel parolis, Lotario kredis, ke tio estis artifiko por pruvi al li, ke tiu viro, kiun li vidis eliri, rilatis al Leonela kaj ne al ŝi. Fine, vidante ŝin aflikte plori kun petoj por trovi rimedon, li kredis la veron; kaj, kredante ĝin, plene li dronis en granda konfuzo kaj pento. Sed, malgraŭ tio, li respondis al Kamila, ke ŝi ne plu ĉagreniĝu ĉar li trovos rimedon por haltigi la malrespekton de Leonela. Krome, ankaŭ li diris tion, kion —instigata de furioza rabio pro ĵaluzo— li rakontis al Anselmo, kaj kiamaniere oni decidis kaŝi lin en la saloneto, por rigardi de tie la malmultan fidelecon, kiun ŝi gardis al li. Li petis pardonon pro tia frenezaĵo, kaj konsilon por povi senefikigi ĝin kaj eliri sukcese el tiu implikita labirinto, kien lia malsaĝa senpripenso lin enmetis. Aŭdinte tion, kion Lotario diris, Kamila sentis teruron; tamen, kun multe da bedaŭro, per multaj kaj trafaj vortoj, ŝi admonis lin kaj riproĉis lian malbonan ideon pri la fuŝa kaj erara paŝo, kiun li faris. Sed tial ke nature la virino posedas spriton ĉiam preta, same por bono kiel por malbono, pli ol la viro, al kiu ofte mankas tio, kiam laŭcele li komencas fari projektojn, tuj post momento Kamila trovis la manieron solvi tiun, laŭŝajne, ne solveblan aferon. Ŝi petis al Lotario zorgi, dum la alia tago, ke Anselmo sin kaŝu tie, kie li diris, ĉar ŝi esperas tiri oportunon el lia kaŝiteco por ke, de tiam estontece, ili ambaŭ povu amuziĝi jam sen maltrankvilo. Ne deklarante komplete sian intencon, ŝi avertis lin klopodi veni tuj, post la embuskiĝo de Anselmo, kiam Leonela vokos lin; kaj ke al ĉio, kion ŝi demandos, li respondu kiel li respondus se li ne scius, ke Anselmo aŭskultas. Lotario insistis, ke ŝi eldiru ĝis la fino sian projekton por povi, pli sekure kaj trafe, atenti ĉion, kion li konsideros necesa.

—Mi diras —rediris Kamila —ke nenion oni devas atenti, krom tio respondi al mi laŭ miaj demandoj.

Kamila ne volis antaŭe klarigi al li, kion ŝi intencas fari, pro la timo ĉu li hezitos sekvi la aranĝon, kiu tiel bona ŝajnis al ŝi, sekvante aŭ serĉante aliajn, kiuj certe ne povas esti same taŭgaj. Post tio foriris Lotario; kaj la sekvantan tagon, je la preteksto iri al tiu vilaĝo de sia amiko, Anselmo ekveturis kaj tuj revenis por sin kaŝi, kion tre facile li povis fari, ĉar Kamila kaj Leonela ĉion ruze preparis. Sin kaŝinte do, kun tiu antaŭtimo, kiun oni povas imagi ĉe viro atendanta vidi, per siaj okuloj, fari sekcadon en la interno de sia honoro, Anselmo troviĝis en la risko perdi tiun plej superan bonon, kiun li konsideris posedi en sia kara Kamila. Plensciaj kaj certaj, ke Anselmo jam sin kaŝis, Kamila kaj Leonela eniris en la saloneton; apenaŭ tien metinte la piedojn, Kamila eligis grandan sopiron kaj diris:

—Ho ve, amikino Leonela! Ĉu antaŭ ol meti en plenumon tion, kion cetere mi ne volas sciigi al vi —por ke vi ne estu baro— ne estus pli bone preni tiun ponardon de Anselmo, kiun mi petis, kaj trapiki per ĝi mian senhonoran bruston? Sed... ne faru tion, ĉar ne estus juste se mi sola portus la punon de fremda kulpo. Unue mi volas scii, kion vidis ĉe mi la malrespektaj kaj malhonestaj okuloj de Lotario, aŭ kio estis la kaŭzo, kiu donis kuraĝon al li por malkovri tiel malpuran deziron kiel tiu, kiun ĵus li malkovris al mi, kun malŝato por sia amiko kaj kun malhonoro por mi. Iru do, Leonela, al tiu fenestro kaj voku lin, ĉar sendube nun li staras sur la strato, atendante efektivigi siau malbonan intencon. Sed unue efektiviĝos tiu mia, kiu estas honesta, kvankam kruela.

—Ho ve, sinjorino mia! —respondis la sagaca kaj lerta Leonela— kion vi intencas fari per ĉi tiu ponardo? Ĉu okaze vi celas forpreni al vi la vivon aŭ ĝin forpreni al Lotario? Kiu ajn el tiuj agoj, de vi elektita, utilos nur por

la pereo de via famo kaj reputacio. Pli bone estas vuali vian ĉagrenon kaj ne ebligi nun al tiu fripono la eniron en la domon, kie li trovos nin tute solaj. Konsciu, sinjorino, ke ni estas malfortaj virinoj kaj li estas decidema viro, kiu venos blinde kaj senbride kun sia malpura intenco; kaj antaŭ ol vi povos efektivigi la vian, certe li trudos ion al vi, kio efikos pli domaĝe ol perdi la vivon. Damne al mia sinjoro Anselmo, kiu tiom da influo volis doni en sia hejmo al tiu senhaŭtiganto! Sed en la okazo, sinjorino, ke vi lin mortigos, kiel vi intencas, laŭ mia opinio, kion do ni faros kun li, post lia morto?

—Kion? ho amikino —respondis Kamila— ni lasos lin per ke Anselmo lin enterigu, ĉar estos juste, ke li trovu ripozon en la laboro, kiun li faros, por meti sub la teron sian propran hontindaĵon. Voku lin, rapidu! Ĉar la tuta tempo, en kiu mi malfruas fari adekvatan venĝon al mia ofendo, aspektas kvazaŭ mi ofendus la fidelecon, kiun mi ŝuldas al mia edzo.

Ĉion ĉi tion aŭskultadis Anselmo; kaj ĉe ĉiu vorto, kiun Kamila diris, liaj pensoj nebuliĝis. Sed kiam li aŭdis, ke ŝi estas preta mortigi Lotarion, li volis eliri malkovrante sin por eviti tion. Haltigis lin la deziro vidi al kio kondukas tiom da kuraĝo kaj honesta decidemo, kun la intenco aperi ĝustatempe por ĝin mildigi. Forta sveno venis tiam al Kamila; kaj, ĵetante sin sur liton, kiu tie troviĝis, Leonela komencis plori tre amare, dirante: «Ho, kia malfeliĉo, se mi estus tiel malbonsorta, ke inter miaj brakoj mortus nun la floro de la honesteco en la mondo, la krono de la bonaj virinoj, la ekzemplo de la ĉasteco!...» Kun aliaj esprimoj, similaj al ĉi tiuj. Aŭskultante ilin, neniu hezitus aserti, ke temas pri la plej afliktita kaj lojala servantino en la mondo, kaj ke ŝia mastrino estas alia nova kaj persekutata Penelope.

Post nelonge, Kamila vekiĝis el sia sveno; kaj, rekonsciiĝinte, ŝi diris:

—Kial vi, Leonela, ne iras voki la plej mallojalan amikon de amiko, kiun lumigis la suno aŭ vualis la nokto? Jen iru, kuru, spronu, marŝu por ke la malfruiĝo ne estingu la fajron de la kolero, kiu min envolvas, aŭ turnu en minacojn kaj malbenojn la justan venĝon, kiun mi atendas.

—Mi iros tuj por voki lin, sinjorino mia —diris Leonela— sed unue donu al mi tiun ponardon por ke, dum mia foresto, nenion vi faru, kio povos liveri motivojn por ploro dum la tuta vivo al tiuj, kiuj funde vin estimas.

—Iru trankvila, amikino Leonela, ĉar nenion mi faros —respondis Kamila— tial ke, kvankam tro impulsiĝema kaj simpla, laŭ via opinio, en ĉi tiu pledo por mia honoro, mi ne iros tiel ekstreme, kiel tiu Lukrecia pri kiu oni diras, ke ŝi sin mortigis pro nenia punindajo, ne mortigante unue la ulon, kiu kulpis pri ŝia malfeliĉo. Mi mortos, en okazo de morto, nur post venĝo kaj kompenso de tiu, kiu donis motivon, ke mi venu al ĉi tiu loko por plori pro liaj malrespektoj, naskiĝintaj tute sen kulpo mia.

Multe da petegoj aŭdis Leonela, antaŭ ol iri por voki Lotarion, sed fine ŝi eliris; kaj dum tiu tempo, ĝis ŝia reveno, Kamila restis dirante, kvazaŭ ŝi parolus kun si mem:

—Dio min helpu! Ĉu ne estus pli saĝe rifuzi Lotarion, kiel multajn aliajn fojojn mi faris, anstataŭ doni al li okazon, kiel fakte mi jam donis, konsideri min malhonesta kaj malfidela, almenaŭ dum la tempo, kiun mi bezonos por disrevigi lin? Des pli bone, sen ia dubo! Sed neniel mi estus venĝita, nek iĝus repurigita la honoro de mia edzo, se per tiel banala peno, aŭ per tiel facila paŝo, li elirus de tie, kien liaj malpuraj pensoj lin enigis. Pagu do la perfidulo per sia vivo tion, kion li celis por siaj malĉastaj deziroj; sciu la mondo (se okaze pri tio ĝi scias) ke Kamila ne nur gardis fidelecon al sia edzo, sed ankaŭ ŝi faris venĝon kontraŭ tiu, kiu maltimis lin ofendi... Tamen, malgraŭ ĉio, mi kredas ke estus pli bone sciigi la aferon al Anselmo;

sed iom mi skizis jam en la letero, kiun mi sendis al li en la vilaĝon; kvankam, laŭ mia kompreno, li ne rapidis al riparo de la difekto, kiun mi anoncis, ĉar li ne volis nek povis kredi —tiel bonanima kaj fidema li estas— ke en la brusto de lia plej granda amiko eblas nesti ajna speco de sentimento aganta kontraŭ lia honoro. Pli poste, dum multaj tagoj, ankaŭ mi ne kredis tion, kion eĉ neniam mi estus kredinta, se lia malrespekto ne tiom alpaŝus, ke faktaj donacoj, logaj promesoj kaj tre oftaj larmoj ne avertus min, kiel klara manifesto. Sed, por kio mi laŭtigas vortojn? Ĉu brava decidemo iel bezonas instigojn? Ne, tute certe! Nu, for la hezitoj! Vivu la venĝo! Aperu do la perfidulo, venu, eniru, mortu, pereu li kaj okazu poste kio ajn!... Pura mi eniris en posedon de tiu edzo, kiun la ĉielo donis al mi por mi, kaj same pura mi volas eliri; kvankam, se necese, makulita nur per mia ĉasta sango kaj per tiu abomena de la plej falsa amiko, kiun amikeco spertis en la mondo.

Dirante ĉi tion, ŝi paŝadis tra la ĉambro, kun la ponardo elingigita, plektante tiel fuŝajn kaj mallertajn paŝojn, eĉ farante tiajn gestojn, ke ŝi aspektis kvazaŭ la saĝo mankas al ŝi, aŭ ke ŝi ne plu estas delikata virino, sed fripono malespera. Ĉion rigardis Anselmo, embuskita malantaŭ la tapiŝoj, kie li sin kaŝis. Li miris pri tio, kaj eĉ li opiniis, ke ĉio, kion li jam vidis, estus sufiĉa kontentigo antaŭ plej gravaj suspektoj. Sekve, li deziris fiaskon en la provo venigi Lotarion, timante ian subitan malagrablan okazaĵon. Sed, preta jam por eliri kaj aperi, por ĉirkaŭpreni kaj trankviligi sian edzinon, li haltis ĉar li vidis, ke Leonela revenas kun Lotario je la mano. Ekvidinte lin, Kamila faris per la ponardo grandan strekon antaŭ si, sur la plankon, kaj diris:

—Lotario, atentu pri tio, kion mi diras: Se okaze vi kuraĝas surpaŝi aŭ nur trairi ĉi tiun strekon, kiun vi vidas, tuj kiam mi rimarkos, ke tion vi intencas, en tiu sama

momento, mi trapikos mian bruston per ĉi tiu ponardo, kiun en la mano mi tenas. Kaj antaŭ ol respondi vorton mi volas, ke ankoraŭ kelkajn miajn vi aŭskultu, ĉar poste vi jam respondos laŭ via plaĉo. Unue mi volas, ke vi diru, Lotario, ĉu vi konas Anselmon, mian edzon, kaj en kia konsidero vi lin havas; kaj due, ankaŭ mi volas scii, ĉu vi min konas. Respondu kaj ne hezitu nek multe pripensu la respondon, ĉar ne pri malfacilaĵoj mi vin demandas.

Ne tiel naiva estis Lotario, ke de la unua momento, kiam Kamila petis lin kaŝi Anselmon, li ne trafis la sencon de tio, kion ŝi intencas fari; sekve, li kontribuis al ŝia ideo tiel lerte kaj tiel ĝustatempe, ke ili ambaŭ povus prezenti ĉi tiun mensogon, kvazaŭ plej evidentan veron; tial, li respondis al Kamila laŭ jena maniero:

—Mi ne supozis, bela Kamila, ke vi vokis min por demandi min pri aferoj tiel fremdaj al la celo por kiu mi venas. Se tion vi faras por prokrasti la promesitan favoron, de malpli proksime vi povus ĝin fordistri; ĉar des pli forte tentas la dezirata bono, ju pli najbare tintas la espero ĝin posedi. Tamen, por ke vi ne diru, ke mi ne respondas viajn demandojn, mi asertas, ke mi konas vian edzon Anselmo, ĉar ni ambaŭ jam rilatas ekde niaj plej fruaj jaroj; cetere, mi ne ŝatas paroli pri tio, kion tiel funde vi scias koncerne nian amikecon, por ne iĝi atestanto en la ofendo, kiun la amo devigas min fari, kio estas ja potenca senkulpigilo eĉ por pli grandaj eraroj. Ankaŭ mi konas vin kaj havas vin en la sama rango, kiun li al vi gardas; ĉar se ne tiel, por malpli altaj kvalitoj ol tiuj viaj, neniel mi agus kontraŭ la devoj de mia propra estimo aŭ kontraŭ la sanktaj leĝoj de la vera amikeco, kiuj troviĝas nun rompitaj kaj profanitaj, fare de mi, pro tiu ĉiopova agento nomata amo.

—Se tion vi konfesas —respondis Kamila— ho ĉefa malamiko de ĉio, kio juste meritas esti amata, kun kia vizaĝo vi kuraĝas aperi antaŭ tiu, kiu —vi scias— estas la

...kaj rapide, ŝi lasis sin fali sur la plankon..

spegulo, kie sin rigardas la persono, en kiu vi devus vin rigardi por konstati, kiel malprave lin vi ofendas? Sed... nun mi komprenas —ho malfeliĉe al mi!— la kaŭzon, kiu igis vin atenti tiel malmulte ĉion, kio dece vin koncernas. Sajne, temas pri ajna senzorgeco mia, kiun oni ne devas nomi malhonesteco, ĉar neniel ĝi venas de pripensita decido,

sed de ia neglekto el tiuj, kiujn multaj virinoj kutimas fari senintence pro la fido, ke kontraŭ nenio ili bezonas sin gardi. Se ne, diru: Kiam —ho, perfidulo!— viajn petojn mi respondis per vorto aŭ per signo kapabla estigi ĉe vi etan ombron da espero, por kontentigi viajn malnoblajn dezirojn? Kiam viaj flataj paroloj ne trovis rifuzojn kaj admonojn, fare de aliaj miaj, kun rigoro kaj ĉagreno? Kiam viajn multajn promesojn mi kredis, aŭ kiam viajn ankoraŭ pli multajn donacojn mi akceptis? Tamen, antaŭ la konvinko, ke oni ne povas persisti longan tempon en amaj aferoj, se oni ne sin nutras per esperoj, mi devas atribui al mi la kulpon de via malrespekto; ĉar, ekster ĉia dubo, ia neglekto mia subtenis tiom da tempo vian obstinon; tial, mi volas min puni akceptante la punon, kiun via kulpo meritas.

Kaj por pruvi al vi, ke, estante mem por mi tiel nehumana, mi ne povos ne same esti por vi, mi decidis venigi vin ĉi tien, kiel atestanton de la ofero, kiun mi intencas nun fari por la makulita honoro de mia honorinda edzo, ofendita de vi per la plej akurata zorgo, kiun vi kapablis, kaj ankaŭ de mi pro la malmulta atento, kiun mi gardis por eviti la okazon, se ian mi ebligis, por favori kaj rajtigi viajn malbonajn intencojn. Refoje mi diras, ke tiu suspekto, kiu min jukas, ke neglekto mia naskigis ĉe vi tiom da erariĝintaj pensoj, estas io, kio plej multe min ĝenas kaj kion plej multe mi deziras puni per miaj propraj manoj, ĉar se punos min alia ekzekutisto, mia kulpo certe fariĝos pli publika; sed antaŭ ol fari tion, mi volas morti mortigante kaj porti kun mi iun per kiu fine kontentiĝos la deziro, kiun mi avidas kaj sopiras, rigardante de tie, kien ajn mi venos, la punon de senpartia justeco, kiu neniel submetiĝos al tiu fripono, kiu puŝis min al ekstremoj tiel malesperaj.

Kaj, dirante tiajn vortojn, kun nekredebla forto kaj

preteco, ŝi ekatakis Lotarion per la elingigita ponardo, kun tiaj elmontroj voli enigi ĝin en lian bruston, ke li preskaŭ dubis ĉu tiu ekscitiĝo estis reala aŭ fiktiva, ĉar nepre li bezonis uzi sian tutan lerton kaj forton por malhelpi, ke Kamila lin trafu. Tiel ŝi ludis tiun strangan artifikon aŭ mistifikon, ke por doni al ĝi koloron de vero, ŝi volis ĝin garni per sia propra sango; ĉar vidante, ke ŝi ne povis trafi Lotarion, aŭ ŝajnigante ne povi, ŝi diris:

—Tial ke la sorto ne ŝatas kontentigi entute mian deziron, ĝi ne estos tiel potenca por eviti, ke, almenaŭ parte, mi povu ĝin efektivigi.

Kaj, strečante fortojn por liberigi la manon kun la ponardo, kiun Lotario tenis, ŝi eligis ĝin. Tuj poste, gvidante ĝian pinton al parto, kie ĝi povis vundi ne profunde, ŝi enŝovis kaj enigis ĝin iom supre de la akselo, ĉe la maldekstra flanko, apud la ŝultro, kaj rapide ŝi lasis sin fali sur la plankon, kvazaŭ ŝi svenus.

Leonela kaj Lotario restis konfuzaj kaj perpleksaj antaŭ la okazaĵo, dubante ankoraŭ pri la vero de la afero eĉ kiam ili vidis, ke Kamila kuŝas sur la planko, malseka per sia sango. Terurigite kaj preskaŭ sen spiro, Lotario alkuris tre diligente eligi la ponardon; kaj rimarkinte la etan vundon, li liberiĝis je la timo, kiun ĝis tiam li havis, admirante denove la sagacon, prudenton kaj multan spriton de la bela Kamila. Tiam, por helpi en tio, kio lin koncernas, li komencis fari longan kaj malĝojan lamentadon super la korpo de Kamila, kvazaŭ ŝi estus sen vivo, laŭtigante multajn malbenojn, ne nur por li, sed ankaŭ por tiu, kiu estis kaŭzo, ke ŝi troviĝas en tia situacio. Cetere, sciante, ke lia amiko Anselmo lin aŭskultas, li parolis laŭ maniero, ke se oni lin aŭdus, oni sentus al li pli da kompato ol al Kamila, eĉ konsiderante ŝin mortinta. Leonela prenis ŝin ĉe siaj brakoj kaj metis ŝin sur la liton, petegante al Lotario iri serĉi iun, kiu sekrete povos ŝin kuraci. Krome, ŝi petis

al li konsilojn kaj instruojn por tio, kion ili diros al Anselmo pri la vundo de ŝia sinjorino, se okaze li revenos antaŭ ol plene ŝi resaniĝos. Ĵi respondis, ke ŝi diru kion ajn, ĉar li ne statas por doni konsilojn taŭge utilajn; li nur atentigis ŝin elviŝi la sangon, ĉar li ekiros, kie la homoj lin ne vidos. Ĵi eliris do el la domo kun elmontroj de granda doloro kaj sentimento; kiam li troviĝis sola en loko, kie neniu lin observis, daŭre li faris al si krucosignojn, admirante la spriton de Kamila kaj la trafajn manierojn de Ĵeonela. Ĵi konsciis, kiel funde Anselmo komprenos, ke lia edzino rangas kvazaŭ dua Porcia; tial, ege li deziris renkontiĝi kun li, por kune celebri la mensogon kaj veron plej lerte vualitajn, kiujn oni povos neniam imagi.

Ĵeonela viŝis, kiel dirite, la sangon de sia sinjorino, kiu ne fluis pli ol necese por fidindigi ŝian artifikon. Ŝi lavis per iom da vino la vundon kaj vindis ĝin tiel bone, kiel ŝi povis; dum la flegado, ŝi eligis tiajn vortojn, ke eĉ sen la parado de la antaŭaj, ili sufiĉus por kredigi Anselmon, ke li posedas en Kamila la emblemon de la honesteco. Aĵ la vortoj de Ĵeonela kuniĝis aliaj de Kamila: ŝi nomis sin malbrava kaj malkuraĝa, ĉar kuraĝo mankis al ŝi en la momento, kiam ŝi plej multe ĝin bezonis por forigi sian vivon, kiun ŝi tiel forte malŝatas. Ŝi petis konsilon al sia ĉambristino, ĉu ŝi devos raporti al sia kara edzo pri la okazaĵo. Ĵeonela proponis diri nenion, ĉar tio devigos lin fari venĝon kontraŭ Ĵotario, kio efektiviĝos ne sen multa risko por li; kaj ĉiu bona edzino havas la devon ne doni por kvereloj okazon al sia edzo, sed eviti ĉiujn laŭ sia eblo. Kamila respondis, ke tiu opinio ŝajnas al ŝi tre saĝa, kaj ke ŝi ĝin sekvos; tamen, ankaŭ estos konvene serĉi, kion diri al Anselmo pri la kaŭzo de tiu vundo, kiun li ne povos ne vidi. Ĵeonela respondis al tio, ke ŝi ne scias eĉ ŝerce mensogi.

—Mi ankaŭ ne, fratino —rediris Kamila— ĉar kiel scii

antaŭ la fakto, ke neniel mi kuraĝos aranĝi aŭ defendi mensogon, eĉ se de tio dependos mia vivo Nu, se vere ni ne scios trovi eliron al ĉi tiu afero, estos pli bone rakonti al li la tutan veron, por ke li ne kaptu nin en mensoga impliiko.

—Ne penu, sinjorino, ĉar de hodiaŭ ĝis morgaŭ —respondis Leonela— mi elpensos, kion diri al li. Kredeble, pro la loko kie la vundo troviĝas, vi povos ĝin kaŝi, ke li ĝin ne vidos; kaj la ĉielo ŝatos favori niajn tre justajn kaj tre honestajn intencojn. Kvietiĝu do, sinjorino mia, zorgu mildigi vian ekscitecon, por ke mia sinjoro ne trovu vin maltrankvila, kaj ĉion ceteran lasu al mia gardo kaj al tiu de Dio, kiu ĉiam protektas la bonajn dezirojn.

Ege atente estis dejoranta Anselmo, por aŭskulti kaj vidi prezenti la tragedion pri la morto de sia honoro, kies protagonistoj reprezentis ĝin kun tiel strangaj kaj efikaj efektoj, ke ŝajne ili transformiĝis en la propra vero de tio, kion ili ludis. Li multe alsopiris la nokton, kiel eblon por eliri el sia domo kaj renkontiĝi kun sia bona amiko Lotario, en kies akompano li plezuros pro la valora lekanteto, kiun li trovis en la konvinko pri la lojaleco de sia edzino. Ambaŭ virinoj akurate zorgis havigi al li okazon kaj ŝancon por eliri, kion li taŭge profitis; tuj poste li venis por serĉi Lotarion; kaj kiam li trovis lin, oni ne povos senerare kalkuli la ĉirkaŭprenojn, kiujn li donis, la aferojn, kiujn pro sia kontento li rakontis, kaj la laŭdojn, kiujn al Kamila li dediĉis. Lotario aŭskultis ĉion, ne povante eksterigi elmontrojn de ĝojo, ĉar en la imago li prezentis al si kiel erare vivas lia amiko kaj kiel maljuste li lin ofendas.

Kvankam Anselmo rimarkis, ke Lotario ne kunĝojas, li vidis motivon en la fakto, ke Kamila restis vundita kaŭze de li; sekve, inter aliaj vortoj, li diris, ke li ne devas afliktiĝi pro la okazaĵo al Kamila ĉar, sen ia dubo, la vundo estis malgrava, tial ke oni interkonsentis kaŝi ĝin al li. Laŭ

tio, de nun estontece, estos nenio por timi, sed multo por ĝoji kaj gaji, ke dank' al lia lerta rimedo li troviĝas supre, sur la plej alta feliĉo, kiun oni povas imagi. Tial li deziras, ke estu liaj distroj ne aliaj ol tiuj fari versojn je laŭdo al Kamila, por eternigi ŝin en la memoro de la venontaj jarcentoj.

Lotario aprobis lian bonan decidon kaj diris, ke siaflanke li helpos masoni tiun admirindan konstruon. Tiele, Anselmo fariĝis la edzo plej frande trompita, kiu povas ekzisti en la mondo: li mem, per sia mano, portis hejmen la detruanton de lia famo, kredante porti la instrumenton de sia gloro. Kamila akceptis lin kun mieno ŝajne severa, sed kun animo feliĉa. Ĉi tiu trompo daŭris plurajn tagojn, ĝis Fortuno turnis sian radon, post malmultaj monatoj; tiam aperis publike la tuta malbonaĵo, garnita interdume per tiom da artifiko, kaj al Anselmo kostis la vivon lia malprudenta scivolemo.

La novelo interrompiĝas nun, ĉar forta bruado aŭdiĝas en la ĉambro, kie Don-Kiĥoto dormas. La brava kavaliro, sub la influo de sonĝo, vekiĝis kaj ekatakis per elingigita glavo iajn felsakojn plenajn de ruĝa vino, kiuj kuŝis apud la lito kaj kiuj ŝajnis al li terura giganto. Ĉiuj alkuras tien por ĉesigi la kuriozan batalon kaj kvietigi la batalanton. Post amuzaj klopodoj, oni sukcesas en tio. La heroo ripozas denove sur lito, ĉiuj ceteraj personoj ree altabliĝas kaj la Pastro vigle daŭrigas la legadon, ĝis fino de la novelo.

Okazis do, ke pro la fido, kiun Anselmo havis al la fideleco de Kamila, li pasigis la vivon kontente kaj senzorge; dume, Kamila ruze montris malplaĉan mienon al Lotario, por ke Anselmo kontraŭe komprenu la veran inklinon, kiun ŝi al li gardis. Por plia konfirmo de ŝia sinteno, Lotario petis permeson al Anselmo por ne plu veni al lia hejmo,

ĉar klare montriĝas la ĉagreno, kiun Kamila ricevas nur vidante lin. Sed la trompita edzo respondis, ke neniel li faru tion; kaj sekve, per mil manieroj, Anselmo men estis la kaŭzanto de sia malhonoro, kredante esti la poluranto de sia gusto. En tia situacio la ĝojo, kiun trovis Leonela, vidante sin kvalifikita en siaj amaĵoj, venis al la ekstremo ke, atentante nenion alian, ŝi kuris post ĝi kun liberaj bridoj, antaŭ la certeco, ke ŝia mastrino protektos ŝin kaj eĉ instruos ŝin pri la rimedoj por povi atingi ĉion kun malmulte da peno. Tamen, iun nokton Anselmo ekaŭdis paŝojn en la ĉambro de Leonela; kaj dezirante eniri tien por scii, kiu ilin aŭdigis, li rimarkis, ke oni ĵus baris la pordon, kio vekis ĉe li pli da obstino por ĝin malfermi; tiom forte li puŝis, ke la pordo cedis kaj li eniris ĝustatempe por vidi, ke viro saltadis tra la fenestro en la straton. Kvankam li aliris rapide por lin kapti aŭ lin rekoni, li ne sukcesis en tio nek alio, ĉar Leonela ĉirkaŭbrakis lin dirante:

—Kvietiĝu, sinjoro mia, ne ekscitiĝu persekutante tiun, kiu de ĉi tie ĵus desaltis: li rilatas al mi tiel efektive, ke li estas mia edzo.

Anselmo ne volis kredi tion; sed blinda pro kolero, li prenis sian ponardon kaj minacis vundi Leonelan postulante, ke ŝi diru la veron; se ne, li ŝin mortigos. Kun timo, ne konsciante siajn parolojn, ŝi diris:

—Ne mortigu min, sinjoro, ĉar mi rakontos al vi aferojn pli gravajn ol tiuj, kiujn vi povos imagi.

—Diru ilin ja tuj! —diris Anselmo— se ne, vi pereos.

—Tio ne eblas nun —respondis Leonela— pro mia multa embaraso; atendu ĝis morgaŭ, kaj tiam mi sciigos al vi ion, kio vin mirigos; krome, estu certa ke la viro, kiu saltis tra la fenestro estas junulo el ĉi tiu urbo, kiu donis promeson iĝi mia edzo.

Post tio, Anselmo trankviliĝis kaj konsentis atendi ĝis

la tempo, kiun ŝi petis, ĉar neniel li pensis aŭdi vorton kontraŭ Kamila, tial ke pri ŝia boneco li estis plene senduba kaj certa; sekve, li eliris el la ĉambro kaj lasis Leonelan enŝlosita, avertante ŝin, ke de tie ŝi ne eliros ĝis ŝi diros ĉion, kion ŝi devas diri. Tuj poste, li venis al Kamila por rakonti al ŝi —kiel efektive li rakontis— ĉion, kio ĵus okazis kun ŝia ĉambristino kaj pri la promeso, kiun ŝi faris, ke ŝi rakontos al li grandajn kaj gravajn aferojn. Ne estas necese diri ĉu Kamila konfuziĝis aŭ ne, sed tiom da timo ŝi ekhavis, kredante vere —kiel vere kredinde— ke Leonela rakontos al Anselmo ĉion, kion ŝi scias pri ŝia malmulta fidindeco, ke ŝi ne havis kuraĝon por atendi ĝis la suspekto montriĝos falsa aŭ ne.

Kaj en tiu sama nokto, kiam ŝajne Anselmo dormadis, ŝi kolektis siajn plej valorajn juvelojn, kun iom da mono; kaj tute nerimarkite, ŝi eliris el sia domo kaj venis en tiun de Lotario, al kiu ŝi rakontis la okazaĵon; ŝi petis lin, ke li metu ŝin sub gardo, aŭ ke ili ambaŭ foriru ien, kie ili povos resti sekuraj de Anselmo. Tioma estis la konfuzo, kiun Kamila portis al Lotario, ke li ne kapablis respondi vorton nek fari konkludon por trovi solvon. Fine, li decidis konduki ŝin al monaĥinejo, kie fratino lia estis la priorino. Kamila konsentis al tio; kaj kun la rapideco, kiun la afero postulis, li venigis ŝin kaj lasis ŝin en la monaĥinejo.

Cetere, li mem ankaŭ tuj foriris de la urbo, donante avizon al neniu pri sia foriro.

En la tagiĝo, pro la forta deziro, kiun Anselmo havis por scii tion, kion Leonela promesis diri, li ne rimarkis ke Kamila ne epudestis. Li ellitiĝis kaj venis, kie li enŝlosis Leonelan; li malfermis kaj eniris en la ĉambron, sed li ne trovis ŝin; li trovis nur iajn littukojn alnoditajn ĉe la fenestro, kiel indico kaj indiko, ke de tie ŝi deglitis kaj forkuris. Li revenis rapide tre malĝoja por rakonti tion al Kamila; kaj ne trovante ŝin en la lito, nek en la tuta domo,

li multe miris. Li demandis la geservistojn, sed neniu sukcesis doni klarigojn el liaj demandoj. Tamen, daŭre serĉante Kamilan, hazarde li vidis malfermitaj ŝiajn kofrojn, kaj ke en ili mankis multaj el ŝiaj juveloj. Per tio, fine, li konstatis la amplekson de sia domaĝo, kaj ke Leonela ne estis la kaŭzo de lia malfeliĉo. Sekve, tiel mem kiel li troviĝis, ne finante sin vesti, malgaja kaj enpensa, li venis por sciigi sian ĉagrenon al sia amiko Lotario. Sed li ne trovis lin, kaj preskaŭ li perdis la saĝon, kiam la servistoj diris, ke Lotario ne pasigis la nokton hejme, kaj ke li kunportis la tutan monon, kiun li havis. Por fina likvido de ĉio, reveninte hejmen, Anselmo trovis neniun el siaj servistoj kaj servistinoj, sed nur la domon sola kaj dezerta.

Li ne sciis, kion pensi, kion diri aŭ kion fari, ĉar iom post iom nebuliĝis lia saĝo. Li sin rigardis kaj rigardadis, tuj en unu momento, sen edzino, sen amiko kaj sen geservistoj; eĉ ankaŭ, ŝajne, sen helpo de la ĉielo, kiu lin kovris, kaj —super ĉio— sen honoro, ĉar en la manko de Kamila li vidis sian pereon. Fine, post longa daŭro, li decidis veni al la vilaĝo de sia amiko, kie li estis, kiam li ebligis ŝancojn por aranĝi ĉi tiun domaĝon. Li ŝlosis la pordojn de sia domo, rajdis sur ĉevalon kaj ekvojiris kun velka animo. Apenaŭ li suriris la duonon, kiam, sub la trudo de siaj pensoj, li devis desalti kaj ligi sian ĉevalon al arbo, apud kies trunko li sin lasis fali, eligante kortuŝajn kaj dolorajn sopirojn; li haltis tie preskaŭ ĝis la vesperiĝo. En tiu horo li vidis, ke de la urbo venadis homo sur ĉevalo; li salutis lin kaj demandis, kiaj novaĵoj estas en Firenzo.

La civitano respondis:

—La plej strangaj, kiujn oni aŭdis tie de antaŭ multaj tagoj, ĉar oni publike diras, ke dum la pasinta nokto, Lotario —tiu granda amiko de Anselmo, la riĉulo, kiu loĝas en Sankta Johano— forprenis Kamilan, la edzinon de Anselmo, kiu ankaŭ malaperis. Ĉi tion rakontis iu ser-

vistino de Kamila, kiun hieraŭ nokte la Gubernatoro kaptis, kiam ŝi deglitis per littuko tra la fenestro de la domo de Anselmo. Fakte, mi ne scias detale kiel okazis la afero; mi nur scias, ke en la tuta urbo oni miras pri la okazaĵo, ĉar oni neniel povis atendi tian agon de la multa kaj familiara amikeco de ili ambaŭ, kiu laŭdire tioma estis, ke oni ilin alnomis *la du amikoj*.

—Ĉu oni scias, cetere —demandis Anselmo— la direkton, kiun sekvis Kamila kaj Ļotario?

—Nek en penso —diris la civitano —kvankam certe la Gubernatoro uzis multe da diligento por serĉi ilin.

—Iru kun Dio, sinjoro —diris Anselmo.

—Restu ĉe Ļi —respondis la civitano forirante.

Post tiel malagrablaj sciigoj, Anselmo preskaŭ borderis la ekstremon ne nur perdi la saĝon, sed ankaŭ la vivon. Ļi leviĝis, kiel li povis, kaj venis ĝis la domo de sia amiko, kiu ankoraŭ nenion sciis pri lia domaĝo. Sed kiam li vidis lin tiel pala, malfreŝa kaj velka, li deduktis, ke grava aflikto lin konsumas. Anselmo petis tuj, ke oni enlitigu lin kaj ke oni havigu al li rimedon por skribi. Oni agis laŭdezire, kaj oni lasis lin sola en la lito, ĉar tion li volis, kaj ke oni fermu la pordon. Vidante sin jam tute sola, li komencis tiom ŝarĝi la imagon pro sia malfeliĉo, ke li komprenis tre klare pro la mortaj premisoj, kiujn li perceptis, ke elĉerpiĝas lia vivo. Tial, li decidis postlasi sciigon pri la kaŭzo de sia stranga morto; kaj, komencante skribi, antaŭ ol fine diri ĉion, kion li volis, mankis al li spiro kaj li forlasis la vivon en manoj de la doloro, kiun kaŭzis al li lia malprudenta scivolemo.

Rimarkinte, ke jam estis malfrue kaj ke Anselmo ne vokis, la mastro de la domo decidis eniri por scii, ĉu la malbonfarto ankoraŭ daŭras. Ļi trovis lin kuŝanta surbruste, kun duono de la korpo sur la lito kaj alia duono sur skribotablo ĉe kiu li estis, kun papero skribita kaj malfaldita,

tenante ankoraŭ la plumon en la mano. La gastiganto venis al li, unue vokante kaj poste skuetante lin per la mano; vidante tiam, ke li ne respondas kaj trovante lin malvarma, li komprenis, ke li mortis. La mastro miris kaj malĝojis grandmaniere; li vokis tuj la hejman personaron por ke oni vidu la bedaŭrindaĵon, kiu ĵus al Anselmo okazis. Fine, li legis la paperon, kiun li rekonis kiel skribitan de lia propra mano, kaj kiu enhavis jenajn vortojn:

«Stulta kaj malprudenta deziro forprenis al mi la vivon. Se sciigo pri mia morto venos ĝis la oreloj de Kamila, sciu ŝi, ke mi ŝin pardonas, ĉar neniel ŝi havis la devon fari miraklojn, nek mi devis postuli al ŝi ilin fari. Do, tial ke mi estis la kaŭzanto de mia malhonoro, ne necesas ke...»

Ĝis tie skribis Anselmo, el kio oni deduktis, ke en tiu punkto mem ne povis finiĝi la frazo kaj finiĝis lia vivo. La sekvantan tagon, lia amiko sendis al la parencoj de Anselmo avizon pri lia morto. Ili jam konis lian domaĝon kaj

la monaĥinejon, kie Kamila estis preskaŭ en situacio akompani sian edzon en lia deviga vojaĝo, ne pro la sciigoj pri la mortinta edzo, sed pro aliaj ricevitaj pri la forestanta amiko. Oni diras, ke kvankam ŝi troviĝis vidva, ŝi ne voiis forlasi la manoĥinejon nek, malpli, fari voton je monaĥino, ĝis ŝi ricevis informojn —ne post multaj tagoj—, ke Ŀotario mortis en batalo, kiun tiutempe prezentis *monsiur* De Ŀautrec al la Granda Kapitano Gonzalo Fernández de Kordobo, en la regno de Napolo, kie laste haltis la malfrue pentinta amiko. Ĝuste sciinte tion, Kamila faris voton kaj likvidis sian vivon, post malmultaj tagoj, en la rigoraj manoj de malĝojo kaj melankolio. Jen la fino, kiun ĉiuj havis, ĉar naskitaĵo tio estis de tute sensenca komenco.

—Bona ŝajnas al mi ĉi tiu novelo —diris la Pastro— sed mi ne povas min persvadi, ke la rakonto estas vera. Kaj, se temas pri fikcio, malbone fikciis la aŭtoro, ĉar oni ne povas imagi, ke ekzistas edzo tiel stulta, kiel Anselmo, por fari tian multekostan eksperimenton. Se ĉi tiu epizodo okazus inter amanto kaj amatino, oni povus ĝin akcepti; sed inter edzo kaj edzino, iom neebla ĝi aspektas.

Tamen, la maniero ĝin rakonti ne malplaĉas.

Presejo: M. PERIS — Gran Via M. Turia, 28 — VALENCIA (Hispanio)

ESPERANTO

LINGVO INTERNACIA